9a Jaro 1912. Januaro 1912.

Unum ovile et unus pastor.
Unu ŝafejo kaj unu paŝanto
(Joh., X, 16.)

# ESPERO KATOLIKA

INTERNACIA MONATA GAZETO, OFICIALA ORGANO de I. K. U. E.

## NIA PROGRAMO.

Okaze de komenco de nova jaro, ni deziras al niaj abonantoj kaj favorantoj sanktan kaj gracoriĉan Novjaron!

Por nia kara revuo *Espero Katolika* la jaro 1912 estas vere nova jaro. Krom novan Direktoron kaj Redaktoron, ĝi de Januaro 1912 ekhavas novan Administranton kaj novan presiston-eldonanton, kaj — ne la malpli grava ŝanĝo — parte novan Programon.

Efektive kun la jaroj *Espero Katolika* multe ŝanĝiĝis. Komence ordinara Esperanta revuo, dediĉita al ĉiuj demandoj, enhavanta diversspecajn temojn de ĉiuspecaj kunlaborantoj, ĝi iom post iom pligraviĝis kaj pliampleksiĝis, kaj kun la ekvekiĝo de la Katolika Esperanto-movado kaj la starigo de la internacia unuiĝo de katolikoj esperantistaj ĝi pli kaj pli akiris aspekton pure katolikan kaj ĉefe praktikan.

„Nia Dua" en Hago decidis akcepti ĝin kiel oficialan organon de I.K.U.E. kaj starigi Akcian Societon por aĉeti ĝin de la ĝisnuna posedanto, por ke ĝi fariĝu komuna kolektiva organo. Ĉar la elektita redaktoro estas Nederlandano, oni tiam jam priparolis ĝian eldonon en Nederlando, sed pro praktivaj motivoj oni decidis provizore daŭrigi la eldonadon en Tours. La sperto montris, ke malutilas al la

intereso de E. K. la granda distanco inter la redaktejo kaj la administrejo (mi nur nomu neeviteblan tempoperdon kaj pli grandajn poŝtelspezojn k. t. p.). Praktikaj motivoj do instigis nin translokigi la administrejon kaj presejon en Nederlandon, kaj estas nia agrabla devo, publike danki S-inon GUIVY kaj la presiston-eldoniston E. MÉNARD kaj K-o. en Tours, kun kiuj ni tiel plezure kunlaboris, spite komplikaĵoj, kaŭzitaj per la multaj ŝanĝoj kaj aranĝoj farotaj. Mi vere miris pri la aktivemo kaj rapidemo de la Tours'aj kunhelpantoj kaj mi estas firme konvinkita, ke la kialo de la antaŭa malreguleco en la eldono de „E. K" nepre ne estas trovebla en Tours. Laŭ mia sperto tio estas tute neebla. Ili estas ambaŭ modeloj de akurateco kaj agemeco kaj mi povas nur esperi, ke la Hagaj samfunkciuloj egalu ilin.

La subskribanto, nova redaktoro, kvankam nevolonte, tamen decidis diri tie-ĉi ankaŭ vorton pri si mem. Vojaĝante al „Nia Dua", mi ne povis supozi, ke al mi minacis la danĝero esti elektata kiel redaktoro. Mi promesis al mia edzineto, kiu jam ofte plendis pri miaj multaj laboroj por Esperanto, kun kiu, laŭ ŝia diro, mi preskaŭ pli edziĝis ol kun ŝi, donante al ĝi preskaŭ ĉiun mian liberan tempon, — mi promesis rifuzi ĉiun novan laboron por Esperanto kaj forlasi post la kongreso parton de mia Esperanta laboro. Antaŭ la speciala kongreskunveno pri E. K., P-ro RICHARDSON vokis min aparte kaj diris al mi pri la deziro de ĉiuj, ke mi fariĝu la redaktoro de E. K.; li en tiu okazo volonte akceptus la funkcion de religia Direktoro kaj volonte kunlaborus kun mi. Kvankam mi kontraŭstaris, dirante ke mi havas tro malmulte da tempo, precipe dum vintro pro miaj kuracistaj okupadoj, li despli insistis — kaj ĉu oni povas ĉagrenigi nian bonegan Prezidanton de I. K. U. E.? Mi ne kuraĝis tion kaj kun peza koro mi ĉeestis la kunvenon. Kvankam jam ordinare pli skribema ol parolema, mi dum la kunveno, en kiu oni proponis kaj elektis min, tute silentis. Kun pli peza koro mi revojaĝis hejmen por ricevi la dolĉajn riproĉojn de mia kara edzineto — sed mi akceptis, kaj akceptante — laŭ mia prin-

cipo: aŭ ne akcepti novan taskon, aŭ akcepti ĝin, sed tiam nepre plenumi ĝin plej bone — mi tuj kun entuziasmo kaj fervorego klopadadis ekfari mian redaktoran devon. Ne por riproĉi iun, sed nur por konstati la fakton: la malfacilaĵoj kaj komplikaĵoj plidensiĝis ĉirkaŭ la novaj direktoro kaj redaktoro, sed, dank' al Dio, fine ne havis la feliĉon vidi la kroniĝon de ĉiuj niaj penadoj. Nur al nia kara P-ro RICHARDSON oni dankas, ke mi ne tute malkuraĝiĝis kaj ke mi, pro konscienco kaj pli altaj devoj, ne eksiĝis el la redakcio.

Nun antaŭen! al *Espero Katolika* mi dediĉas ĉiujn miajn fortojn, donitajn al mi de Dio. Eble mi ne tute kontentigos la katolikan esperantistaron; sed pri unu afero mi estas certa: neniam oni povos konstati, ke mi ne laŭ ĉiuj miaj fortoj laboris por nia kara revuo.

***

Kiu nun estas nia Programmo?

**Nepra katolika ortodokseco.**

1-e. Vere ne estas bezone deklari, ke ni jam antaŭe, en ĉio, plene submetas nin al la deziroj de la Eklezia Aŭtoritato. La celo de I. K. U. E. estas: servi la interesojn de la Katolikismo, kaj *Espero Katolika*, la oficiala organo de I. K. U. E., ne povas havi alian celon. Vere gravega celo! I. K. U. E. servanto de la Katolikismo, de nia amata Katolika Eklezio kaj de ĝiaj Estroj, la posteuloj de tiuj, al kiuj la Difilo donis la doktrinan aŭtoritaton dirante: „Iru „vi kaj instruu ĉiujn naciulojn, baptante ilin kaj instruante „ilin teni **ĉion,** kion Mi ordonis al vi". — Servanto ja plenumas kompreneble la ordonojn kaj dezirojn de sia mastro. Kaj I. K. U. E. kaj E. K., kies nobla funkcio estas la servado de la dum miljaroj triumfanta kaj, laŭ Dia promeso, nedetruebla vera Religio, I. K. U. E. kaj E. K., la servantoj de la Katolikismo, nature kaj memdire obeas la ordonojn kaj plenumas la dezirojn de siaj Mastroj, kiuj, klarigitaj de la Spirito Sankta, nur povas instrui ĉion, kion ordonis al la homoj la Difilo.

2-e. Nepre katolika pro ĝia enhavo.

Nia religia Direktoro, P-ro RICHARDSON travidos la ma-

nuskriptojn por prijuĝi ilin laŭ religia vidpunkto. Pri tio li estas tre severa kaj oni povas esti certa, ke ne enŝoviĝos suspektaj hipotezoj kaj teorioj, kiujn oni trovas, sub la erariga etiketo: „**la** scienco", en prireligiaj artikoloj de ne-katolikoj.

Sed precipe mi atentigas pri jeno: Kiam ekzemple kuracisto abonas medicinan revuon, tiam li deziras nepre en ĝi profesiajn artikolojn; pro artikoloj pri alispecaj temoj li abonas aliajn revuojn. Tiel ankaŭ *Espero Katolika*, la oficiala organo de la Internacia **Katolika** Unuiĝo, enhavu precipe artikolojn pri **katolikaj** aferoj. Nia katolika mondo mem tute sufiĉas por plenigi kaj variigi la paĝojn de nia katolika revuo; jen katolika ĝardeno, el kiu iu kolektas bonodoran kaj belkoloran bukedon da ĉarmaj katolikaj floroj, por ĝojigi niajn E. K.-gastojn; jen oni rikoltas la katolikajn fruktojn, kreskintajn sur riĉe kulturitaj kampoj, por ke niaj E. K.-legantoj ilin gustumu kaj estu instigataj al imito; jen oni ekkulturas la, laŭ organiza vidpunkto, ankoraŭ tute senkultura kampo de la katolika internaciismo, k. t. p.

Kvankam mi nur ekkomencas redakti „E. K", mi, krom multe da aproboj kaj alkuraĝigoj, ricevis ankaŭ kelkajn plendojn. Mi citas nur unu, ricevitan de persono, de kiu mi ĝin malplej atendis. Tiu plendo tiel mirigis min, ke mi decidis priparoli ĝin en „E. K". Verdire tiu plendo estas la kaŭzo de tuta tiu-ĉi artikolo. Montriĝas, ke estas necese detale klarigi al niaj legantoj nian programon.

Tiu persono skibas i. a.: „Ankoraŭ mi petas permeson „aldoni kelkajn vortojn pri elekto de artikoloj. Ne forgesu, „Estimata Sinjoro, ke niaj abonantoj ne estas ĉiuj pastroj, „ke pro tio ili ne volas legi tiom da religiaj artikoloj, kiuj „nur interesas la pastrojn."

Jen, laŭ mi la pastroj estas ne la malpli grava kaj inda parto de nia **katolika** movado; doni iom da atento al ili en oficiala organo de pure katolika revuo, ne estas tro kulpinda, laŭ mia humila kaj modesta opinio; sed cetere, ĉu estas vere, ke inter katolikoj nur la pastroj interesiĝas pri religiaj artikoloj? Se vere, mi ekklamus: Kia bedaŭrinda fakto!

Ĉu oni ne rajte plendas ĉie, ke la plej granda malfeliĉo estas, ke la katolikoj mem ne sufiĉe konas la doktrinon de la Katolika Eklezio? Sed estu, ke **pure katolika** (kaj unika internacia esperanta) revuo estu riproĉinda (laŭ la opinio de kelkaj) pro tio, ke ĝi enhavas multajn religiajn artikolojn, tamen mi estas certa, ke la veraj, fervoraj, agemaj katolikoj ne parolos tiel.

Ĉiuokaze *Espero katolika* estas la organo de I.K.U.E., **kies celo estas servi la interesojn de l'Katolikismo,** kaj do ĝi estu konforma al tiu celo. Ĉio, kio utilas al la servado de l'Katolikismo, estas do la **propra enhavo de E. K.** Pro kio eldoni „*Espero Katolika*" kiam ĝi enhavus precipe noveletojn, anekdotojn, tradukaĵojn de naivaj kaj dolĉaj rakontoj? Ĉu ne ekzistas pli ol cent da esperantaj gazetoj, en kiuj oni trovas jam tion ĉion, pli aŭ malpli gravan kaj valoran laŭ la graveco de la gazeto? Oni povas legi unu aŭ pli el ili laŭ sia gusto kaj bezono. — Kompreneble „*Espero Katolika*" ne tute rifuzos **literature aŭ science vere valorajn** artikolojn pri ne-katolikaj aferoj. Sed estos escepto: E. K. enhavos sian propran materialon laŭ sia karaktero kaj celo.

Plue nia kritikanto forgesis alian gravan aferon. La proverbo diras: „Catholica non leguntur": Katolikaj verkoj ne estas legataj. Pro tio la ne-katolikoj, ĉerpante sian konon pri Katolikaj Eklezio kaj Doktrino kaj institucioj el ne- aŭ kontraŭkatolikaj fontoj, havas aŭ tute nenian aŭ tute malveran konon pri katolikaj aferoj.

Same kiel ne-esperantistoj kredas la ridindajn sensencaĵojn, kiujn kritikanto skribas pri Esperanto kaj Esperantomovado kaj kiujn li proponas al la kredema publiko „kiel rezulton de scienca esplorado kaj logika rezonado"; same kiel ne-esperantistoj akceptas senkontrole la eldirojn de tiu „lingvistika aŭtoritatulo", kvankam tiu-ĉi konas eĉ ne unu literon de la Esperanta alfabeto kaj juĝas kiel blindulo pri koloroj; same kiel ne-esperantistoj kredas blinde al la fantaziaj hipotezoj kaj teorioj de tiu „kompetenta klerulo", kies ĉiu vorto estas primokata kiel malsaĝaĵo per tiom da mil faktoj nerefuteblaj — same kiel ne-esper-

antistoj rilatas al Esperantujo, tiel ankaŭ ne-katolikoj rilatas al la Katolika Religio.

Vere plorinda estas vidi, ke niaj bonkoraj kaj noblaj nekatolikaj fratoj juĝas pri ni tiel mallerte kaj malsaĝe. Kredante la ridindajn fabelojn pri Katolikismo, eltrovitajn de senkonscie erarigitaj aŭ konscie trompantaj „scienculoj", ili, blindigitaj per la brilo de senfundamentaj hipotezoj kaj teorioj, ne plu rimarkas la ĉie radiantan sunon de la Vero, brilantan dum miljaroj sur la religia ĉielo. —

La Katolikaj Esperantistoj estas ligitaj kun siaj aliakredaj Samideanoj per tiom da ligoj de idealoj, agadoj, ŝatateco kaj amikeco. Nin konante, tiuj Samideanoj ne hontos legi nian Esperantan Revuon Katolikan. Tiel nia *Espero Katolika* kontentigos multnombron da personoj, kiuj intime deziras konatiĝi kun ni kaj ekscii niajn katolikajn idealojn kaj ideojn. — Kaj ne forgesu la devizon sur la kovrilo: „Unumovile et unus pastor". Ĉu ne la Anglikano kaj la Rus-ortodoksulo, kiuj partoprenis tiel aktive Nian Unuan Kongreson en Parizo, konatiĝis kun ni kaj deziris interrilati kun ni: nur per legado de *„Espero Katolika"?*

Kiom da disigitaj fratoj kore deziras legi katolikajn religiajn artikolojn. . . . kiuj laŭ nia kritikanto „nur interesas la pastrojn"?

Sufiĉas! Mi eble iom tro detale skribis pri tiu punkto, sed unufoje kaj por ĉiam mi volas komprenigi al niaj legantoj, ke, pro la karaktero de E. K., pro la celo de I.K.U.E. pro la intereso de Katolikoj kaj ne-Katolikoj, *„Espero Katolika"* devas esti **speciale Katolika** gazeto. Se iu katolika abonanto forlasos nin pro tio, ke ni iras rekte al nia celo kaj ke li ne trovas sufiĉe da tradukitaj noveloj en nia revuo, ni tre bedaŭros tion; aŭ pliĝustadire ni ne tre bedaŭros tion: tia katoliko ne utilas al nia katolika internacia movado, kiu fakte interesas lin neniel. Sed ni estas certaj, ke ni varbos la agemajn, entuziasmajn, fervorajn Katolikojn. — Vi legos en la artikolo: *„Inter ni"*, subskribita de travidebla sinonimo: „Aro", ke „ni volas altiri al nia internacia agado la tutan latentan talenton en la Katolika Esperantistaro; ni volas, ke *Espero Katolika*

fariĝu inda ne nur je sia nobla Fondinto, sed ankaŭ je la S-ta Religio, kies defendo estas la nura kialo de ĝia ekzisto."

Nur viva praktika Katolikismo vivigos nian „*Espero Katolika*"; siavice **E. K.** ree naskos en ĉiam pli larĝaj rondoj vivan praktikan Katolikismon.

***

**Nepra lingva ortodokseco.**

Estas necese diri ankaŭ kelkajn vortojn pri nia fideleco al la Zamenhofa lingvo, kvankam fakte ni, Katolikoj, ne bezonas eldiri tion, ĉar nia fideleco estas nedubebla fakto en la historio de Esperanto.

Mi preskaŭ tute forgesis, ke ekzistas Ido kaj Idistoj; sed post kiam mi fariĝis redaktoro de E. K., mi eĉ por la unua fojo estis suspektita kiel... idisto! Ho! vi Esperantistoj pli fidelaj al Esperanto ol ZAMENHOF mem! Kiom da malbono vi semas per via suspektigo kaj herezigo de aliaj!

Pri mia persono mi nur citas tion, kion mi skribis kiel redaktoro en la antaŭparola artikolo de la unua numero de *Nederlanda Katoliko* (Januaro 1910, p. 3.):

„Estis juĝate nenecese, aldoni en la Regularo al la vorto Esperanto: „Zamenhofa". Ni konas nur **unu** Esperanton. Ni scias, ke ĝi estas multe pli ol sufiĉa en la plenumado de sia tasko kiel internacia lingvo, kaj ke ĝi ne bezonas plibonigojn pri ĉefpunktoj kaj eble eĉ ne pri malgravaj neĉefaĵoj, sed ke tiuj „plibonigoj" ja senpere naskiĝos naturmaniere per la uzado de Esperanto. La pli ol dudekjara uzado de Esperanto sur ĉiu imagebla kampo brulstampas ĉian iom influegan aliformigon kiel arbitran, kiel nenecesan, kiel nebezonan kaj neutilan....

„Tio ĉio sufiĉu por konigi unufoje kaj por ĉiam nian vidpunkton kontraŭ la plej grandaj malamikoj de la internacia lingvo: la reformistoj. Ni ne plu parolos pri tio, konkludante per la vortoj de nia *Espero Katolika* (Januaro 1909): „Ni do uzados la **Zamenhofan** Esperanton sen-„diskute, lasante tiujn, kiuj havas tempon por malŝpari, „ĉikani pri hipotezaj plibonigoj. Ni volas esti laboremuloj, „ne revemuloj."

Tion mi skribis jam antaŭ du jaroj! Tamen la plejfidel-

eguloj demandis al mi, ĉu mi fariĝis idisto, kaj ili citas i. a. preserarojn, por pravigi sian suspekton. Tiujn, kiuj ne konis la komplikitajn cirkonstancoj, je kiuj mi en 1911 devis redakti E. K., mi volonte volas senkulpigi; sed tiuj, kiuj scias, ke ĉio estis ĥoaso, ke estis neeble bone prizorgi la redaktadon, estis iomete malicetoj.

Kun serioza mieno oni suspektas min esti idisto i. a. pro la abomenaĵo, ke en la Nov. num° de E. K. troviĝus la vorteto „Oh!".

Ni ne pli diros pri tio. Mi tamen volonte kuraĝas konfesi, ke mi ne volas esti pli severa ol ZAMENHOF mem. Nia Majstro ĉiam diras, ke la lingvo Esperanto devas evoluiĝi per la uzado. Ni transskribas el *„Esperanta Sintakso"* de P. FRUICTIER jenajn: „En Esperanto estas nur *a)* unu stila regulo: skribi plej klare. Kio estas klara, tio povas esti nekorekta, sed neniam malbona; *b*) unu malpermeso: skribi malklare. Kio ne estas klara, tio povas iufoje esti korekta, sed neniam bona."

Plue, ne estas necese, ke ĉiu artikolo en *Espero Katolika* havu almenaŭ tiel bonan stilon, kiel la stilo de ZAMENHOF mem. Ĉefaĵo estas, ke **en E. K. aperu artikoloj, kiuj tute taŭgas por ĝia celo.** Kompreneble ni preferas artikolojn ekzemplajn je lingva kaj stila vidpunkto; sed nia gazeto ne estas **lingva** gazeto, kaj do oni ne prijuĝu ĝin **nur** laŭ lingva kaj stila vidpunkto.

Ni, Katolikoj, estas ortodoksaj Zamenhoflingvanoj, spite eblaj preseraroj en la teksto de niaj artikoloj, spite unu, eble nerimarkita, malpli bona Esperanta vorto en iu numero.

Laŭ kutimo ni, Katolikoj, ŝatas laŭprudentan aŭtoritaton kaj volonte submetiĝas al la Fundamento, kiu montriĝis bonega kaj necesega. Sed ni malŝatas la lingvan liberpensadon. [1])

---

[1]) Irlanda Pastro skribis nin post ricevo de nia novembra No.: „Okaze de via artikolo kaj tiu de Abato RICHARDSON, venis al mi en la kapon la penso, ke rimarkinda estas la analogio inter la, tiel nomita, **„libera penso"** kaj la „Ido". Ĉe la unuj granda estas la batalo inter la religia aŭtoritato kaj la, rilate al la religio, libera-

Sufiĉas, por sufoki tuj ĉe la naskiĝo la fabelon pri estinta aŭ estonta idisteco de Katolikoj, apartenantaj al I. K. U. E. kaj E. K. Ĉiu I. K. U. E.-ulo estas nepre ortodoksa katoliko kaj ortodoksa esperantisto. Se ne, li iru for de ni!

* * *

**Pluaj sciigoj.**

Ni deziras, ke *Espero Katolika* fariĝu plej grava kaj pro tio ni decidis enkonduki **pagitajn artikolojn.** Krom por la artikoloj de la redakcio kaj por la diversaj sciigoj, ni pagos de post 1 Januaro 1912 po paĝo al niaj kunlaborantoj. Komence (atendante la plimultiĝon de nia abonantaro) la sumo ne estos tro granda. Cetere la sumo estos taksata laŭ la graveco kaj literatura aŭ scienca valoro de l'artikoloj; laŭ la eminenteco de la verkisto; laŭ originale verkitaj aŭ tradukitaj artikoloj; laŭ petita aŭ propramova labora, k. t. p. Ni esperas ke tiu ĉi nova enkondukaĵo havos bonegan efikon kaj instigos multajn kompetentulojn kunlabori al nia revuo.

Ĉar antaŭe troviĝis sur la kovrilo listo de **kunlaborantoj,** el kiuj multaj jam de longe ne kunlaboris en E. K., ni forigis tiun liston, kaj petas afable, ke almenaŭ unu persono el ĉiu lando bonvolu esti Kunlaboranto de E. K. ĉu per alsendo de artikoloj aŭ sciigoj, ĉu per instigo de siaj samlandanoj por apogi E. K.

Ni ankaŭ forigis la liston de **abonejoj** de **Esp. Kat.** kaj petas tiujn, kiuj deziras esti Abonejoj, sciigi siajn nomojn kaj adresojn.

La **jara abono** estas por **ĉiuj** landoj **2 Sm.** Al librejoj ni donas rabaton. Ni enkondukas **kolektivan abonon.** Ĉiu povas organizi ĝin (ĉu sekretarioj de sekcioj, ĉu aliaj personoj, ĉu librejoj k.t.p.) Kondiĉo estas: **Almenaŭ 50 abonantoj, antaŭa pago de la kolektiva abonmono kaj antaŭa alsendo de la listo kun nomoj kaj adresoj de la kolektivaj abonantoj** (tiu lasta postulo estas necesa por la kontro

---

penso. Ĉe la aliaj la batalo estas inter la lingvista aŭtoritato kaj la lingvista liberapenso. Do kun la Idistoj oni devas ĉiam sampensi niajn Liberpensulojn, kiuj ne estas (iliaj agaĉoj tion montras) vera Zamenhofaj Esperantistoj."

lo kaj por eviti konfusaĵojn. La administracio de E. K. devas esti informata, ĉu iu antaŭe **komuna** abonanto fariĝis poste **kolektiva** abonanto.) — La organizanto de la kolektiva abono antaŭpagos **1.50 Sm.** po abonanto. Kompreneble ne estas nia afero, kiam la organizanto postulos, pro sia administrado, de ĉiu kolektiva abonanto iom pli ol 1.50 Sm. Tio estas afero inter la organizanto kaj la partoprenantoj en la kolektiva abono.

Ĉiu numero ĝenerale estos proksimume 32-paĝa. Tamen laŭ la pligrandiĝo de la abonantaro ankaŭ la amplekso de E. K. regule pligrandiĝos. Ni do petas ĉiujn pro ilia propra intereso **senĉese varbi novajn abonantojn.** Ĉu ne estas hontige, ke dum la vivo de P-ro PELTIER la nombro de la abonantoj de E. K. estis pli granda ol nuntempe? Antaŭ kvin jaroj la Esperanto-movado estis nur pigmeo kompare je la giganta Esperanto-movado, precipe inter Katolikoj, en la jaro 1912! Ni do kiel eble plej baldaŭ neigu tiun-ĉi hontigan fakton.

Por la bonfarto de gazeto estas tre grave tio, ke ĝi ricevu multajn **reklamanoncojn.** Nia E. K. estas legata tra la tuta mondo, en ĉiuj landoj. Pro tio la grandaj katolikaj eldonistoj povos havi grandan profiton, reklamfarante en nia revuo. En la eklezia internacia lingvo latina eldoniĝas tre gravaj latinaj verkoj, legeblaj de pastroj kaj kleruloj en ĉiu ajn lando. Ofte ĝisnun la legantaro de tiuj verkoj estis precipe personaj de la sama lando, kie aldoniĝis tiu verko. Per reklamo en *Espero Katolika* tia eldonisto atingas aĉetontaron multe pli grandan. Same pri verkoj en Angla, Franca, Germana lingvoj, kiujn lernis multaj el niaj gelegantoj. Nia abonantaro do atentigu la eldonistojn pri tio ĉi, kaj klopodu ankaŭ por varbi alispecajn anoncojn por nia revuo.

La Esperantaj Gazetoj estas petataj **intersanĝi** kun *Espero Katolika* kaj alsendi **librojn** por recenzo. — Ni volonte recenzigos ankaŭ gravajn katolikajn verkojn, skribitajn en aliaj ĉeflingvoj, per konatigi kun ili nian legantaron. Ankaŭ volonte ni interŝanĝos kun katolikaj revuoj alilingvaj.

Kvankam kelkaj petis, ĉu la redakcio de E. K. bonvolu resendi manuskriptojn nepresitajn, kaj kvankam mi komence inklinis por fari tion, tamen mia opinio post mallonga redakcia funkciado tute ŝanĝiĝis. Do — kiel ĝis nun okazis, kaj laŭ kutimo ĉe preskaŭ ĉiuj esperantaj gazetoj — **oni ne resendas artikolojn nepresitajn.** Kompreneble la redakcio rezervas al si la rajton, korektigi laŭbezone la manuskriptojn.

Pro la multego da ŝanĝoj, kiuj povus kaŭzi multajn konfusaĵojn, ni decidis, ke *Espero Katolika* havas *provizore* **nur unu solan adreson,** nome tiun de la subskribanto:

DRO SMULDERS,
Schijndel (Nederlando).

---

# INTER NI.

Karaj gelegantoj de „*Espero Katolika!*

La nova Redaktoro tre deziras ĝui bonajn interrilatojn kun vi. Nia revuo estas al ni ambaŭ tre kara. Ĝi memorigas al ni sian bonan, sanktan fondinton, la ĉiam bedaŭratan Abaton PELTIER.

Al la starigo de E. K. Abato PELTIER oferis sian tempon, sian monon kaj sian vivon. Al tiu pia pastro, ni, Katolikoj, ŝuldas la situacion, kiun ni nun ĝuas en la Esperantista movado. Kiam li decidis fondi Katolikan Revuon, eĉ liaj amikoj malkonsilis al li tiun agon, kaj la malamikoj de Esperanto mokis la ideon. Sed Abato PELTIER ne estis ordinara viro. Li antaŭvidis preskaŭ profete la mirindan estontecon de Esperanto. Li nepre volis, ke tiu batalilo ne restu ekskluzive inter la manoj de la ne-Katolikoj. Sed por estigi Esperanton vere utilan al la Katolika Eklezio, li sentis la neceson de internacia Katolika Organo. Plue, li sentis, ke tiu organo, sub la bela nomo de „*Espero Katolika*", devas esti, eĉ je la komenco, grava, serioza, Katolika Revuo. Li estis tre malriĉa, havis tre malfortan sanon, kaj estis tre okupata pri siaj pastraj devoj, tamen li sukcesis fondi Revuon, kiu de la unua numero faris impreson, kaj

gajnis la estimon de la tuta gazetaro Esperantista. Tiu famo, ni, la posteuloj de nia kara Abato PELTIER, volas konservi, eĉ ni havas la ambicion diri, ke ni volas ĝin pligrandigi. Sekvante la planon de nia fondinto mem, ni volas, tiel kiel li volis, altiri al nia internacia organo la tutan talenton latentan en la Katolika Esperantistaro, ni volas, ke *„Espero Katolika"* fariĝu inda ne nur je sia nobla fondinto, sed ankaŭ je la S-ta Religio, kies defendo estas la nura kialo de ĝia ekzisto. Nu, kvankam ni jam ricevis multajn gratulojn, senditajn al ni de multaj abonantoj kaj legantoj de E. K., ni devas konfesi, ke inter la floroj de ni ricevitaj, kuŝis sufiĉe da dornoj.

Tre fama esperantista estro, inter aliaj, post belaj komplimentoj pikis la redaktoran manon per sufiĉe akraj riproĉoj pro niaj tro oftaj preseraroj, sed la plendoj la plejmultnombraj rilatis al la malreguleco de la apero de E. K. Ni devas konfesi ke, estinte, la ĵurnalo tre ofte aperis tro malfrue. Tial ke ne estas eble al ni klarigi la kialon de tiu estinta malreguleco, ni povas nur ripeti tion, kion ni jam diris: la kialo neniam estis manko de bonvolo, sed diversaj cirkonstancoj tute ne-dependantaj de nia volo. Sed ni kuraĝas diri, ke *kun* kaj *per* la helpo de niaj karaj abonantoj, *„Espero Katolika"* komencos novan vivon kaj ne plu, estonte, donos lokon al iu pravigebla plendo.

Rimarku, ni aldonis: „kun la helpo de niaj abonantoj". Efektive, malnova franca proverbo diras, „la bonaj kontoj faras la bonajn amikojn", kaj sincere, oni kelkfoje forgesis la tro elementan fakton,ke la regulareco ĉe iu ĵurnalo multe dependas de la reguleco de la pago de la abonoj. Ĝenerale niaj abonantoj estas senriproĉaj je tiu punkto, tamen estas al ni malagrable sciigi, ke kelkaj abonantoj, ***sufiĉe multnombraj***, forgesis, malgraŭ pluraj avertoj, pagi siajn abonojn de *post pluraj jaroj*. Ni ne deziras fari tiel kiel aliaj ĵurnaloj, kaj publikigi en nia Revuo la nomojn de la malfruuloj. Ni esperas, ke tiu grava averto sufiĉos kaj ke ili ĉiuj respondos al la presita averto, kiun ni proponas sendi al ĉiu tre baldaŭ.

Alia peto kiun ni faras al niaj geamikoj estas labori,

penadi, por varbi novajn abonojn al nia E. K. La abonprezo estas nur 2 Sm. Kie estas la sincere fervora esperantista Katoliko, kiu ne povas, ĉu persone, ĉu grupe, trovi 2 Sm. por aboni la oficialan Organon de tiel ŝatinda tutmonda Societo kiel I. K. U. E., kies nura celo estas la defendado de la Sankta Katolika Religio? Nu, internacia organo estas tiel necesa al I. K. U. E., kiel la aero estas necesa al vivanta homo. La oficiala Organo estas la internacia ligilo, la rimedo, per kiu la Katolikaj Ligoj, dissemitaj en la diversaj landoj de la mondo, povas interrilati, kaj, sen oftaj, konstantaj interrilatoj, societoj tiel kiel I. K. U. E. ne povas agi, ne povas vivi. Ekzemple: ĉu oni povas eĉ imagi la ekziston de U. E. A. sen la ekzisto de tiu modela, tutmonda ĵurnalo „*Esperanto*"? Nu, I. K. U. E. estas ne nur Esperantia Entrepreno, sed ĝi estas ankaŭ starigita laŭ la sama plano kiel U. E. A., ĝi faras al la Katolikaro servojn similajn al tiuj, kiuj U. E. A. faras al la Esperantistaro je la vidpunkto de materiaj aferoj.

Jen, karaj gefratoj, tio, kion ni havis sur la konscienco. Nun faru ni reciproke nian devon, laboru ni ĉiuj por Dio kaj por lia Sankta Eklezio, preĝu, ĉar ĉio devas alveni al ni de Dio, sed laboru, ĉar, laŭ la dia ekonomio „Dio helpos tiujn, kiuj helpos sin mem".

„*ARO*"

---

# Diverslandaj Katolikoj,

## VI EKPENU RECIPROKE VIN EKKONI KAJ KUNIĜI.

Dank' al la Kreanta Ĉiupovo ni estas la *homoj*, dank' al Lia graco ni estas la *katolikoj*. Esti katoliko signifas havi la komunan katolikan kredon, obei al unu de Di' fondita hierarĥio, kaj tiamaniere aparteni kiel membro al unu plej granda en la mondo *societo*, konata al ĉiuj je la nomo de *la katolika Eklezio*. Nomante ĝin plej granda, ni tute ne troigas, ĉar ĝi havas ja milionojn da membroj, dissemitaj sur la tuta tero, loĝantaj en ĉiuj landoj kaj regnoj, kaj apartenantaj al ĉiuj rasoj, gentoj kaj nacioj.

En la nuntempa epoko aperas multe da homoj kaj societoj, kiuj laŭte predikadas pri la egaleco, libereco kaj frateco de nacioj. Laboras ili multe, fervore kaj sindoneme, sed, bedaŭrinde, ĝis nun ankoraŭ sensukcese, ĉar la nuntempaj internaciaj rilatoj politikaj, religiaj kaj eĉ komercaj restadas, kiel antaŭe, tre malproksimaj de la idealo. Al la belaj suprediritaj principoj en la teorio respondas ĉie tre malbela realeco en la praktiko. Teoriaj „fratoj" rigardadas sin ĉie kiel veraj lupoj. La blankhaŭtuloj amerikanoj ekzemple malamas la nigrhaŭtulajn negrojn kaj flavhaŭtulajn japanojn. Siavice por la amasoj ĥinaj ĉiu eŭropano estas nur „blanka diablo". Kaj inter la blankhaŭtuloj mem, kiom da reciproka malkonfido, envio kaj eĉ malamo! La franco malamas la germanon; la germano — la polon, la polo — la ruson, la ruso — la hebreon k. t. p. Ĉie reĝas plej nigra malamo, kvankam ĉiuj suprenomitaj nacioj havas la saman blankan haŭton.

Tiamaniere la liberulaj principoj de egaleco, libereco kaj frateco en ĉiuj regnoj kaj respublikoj, eĉ la plej kulturaj kaj progresemaj, restas ĝis nun nur belaj, sed malrealaj kaj ofte eĉ malsinceraj parolaĉoj. La sola societo, kies agoj ne kontraŭdiras la supre memoritajn principojn, estas nur la Eklezio katolika, ĉar ĝi, estante fidela al la Krista ordono: *Irante vi instruu ĉiujn gentojn*, rigardas ĉiujn popolojn kun egala amo, farante nenian diferencon inter nacioj civilizitaj kaj barbaraj, konsiderante ĉiujn kiel verajn efektivajn fratojn, laŭkorpe devenantajn de unu patro Adamo sur la tero, kaj laŭanime — de unu komuna Patro Dio en la ĉielo.

Tiamaniere la Eklezio estas la sole *vere liberala* kaj vere *universala asocio*, en kiu ĉiuj membroj estas ŝatataj kaj traktataj ne *sole en la teorio*, sed ankaŭ *en la praktiko* kiel *veraj fratoj*, havantaj egalajn rajtojn, tute sendepende de ilia raso, haŭtkoloro, lingvo, nacieco k. t. p. Ĉu iu katoliko estas eŭropano, ĉu japano, ĉu negro, ĉu ruĝhaŭtulo — ĉiuj estas rigardataj kiel filoj de la Eklezio, lavitaj egale per la Krista sango, savotaj per la Krista morto kaj destinitaj, por esti feliĉaj en la regno ĉiela je eternaj eternaĵoj.

Tiu ĉi konsidero, estante sole vera teorie, estas samtempe ankaŭ vere progresema en la praktiko. Ĉar, se ni katolikoj de iu ajn nacio estas veraj fratoj en Kristo, ni ja havas *gravan devon de universala internacia katolika solidareco*, ne sole en nia kredo sed ankaŭ en ĉiuspeca agado — scienca, komerca, k. a. Simile al antikva filozofo dirinta: *homo sum et nihil humanum a me alienum puto,* ni, nuntempaj katolikoj, kaj precipe katolikoj-esperantistoj, povas kaj eĉ devas diri al ni mem: *ni estas ja katolikoj, kaj tial nenia katolikaĵo estu al ni fremda.* Ĉio, kio rilatas la katolikan vivon en diversaj landoj, devas nature nin interesi, kiel io al ni mem propra kaj proksima. La Eklezio estas ja Krista korpo, ni do — ĝiaj membroj, kunligitaj kun ĝi vere, kvankam mistike. Do tiu ĉi reciproka rilato kreas por ni la devon — ellaboradi en ni pli da reciproka kompato kaj komuna sentpovo, por ke ni ne meritu la riproĉon, ĵetitan de PAŬLO Apostolo sur antikvajn idolanojn, kiel homojn *sine affectione.* Ĉar kia *korpo* estas la Eklezio, se ĝiaj *membroj ne sentadus la komunan vivon,* se unu membro de tiu sama organismo tute ne scius, kiel fartas la alia k. t. p.

En la nuntempa mondo oni renkontas nemalofte la ŝatadon de scio pro la scio kaj de sento pro la sento. Ni ne imitu tion. Niaj sento kaj scio ne estu sencelaj kaj senvaloraj. Pli sentemaj kaj sciemaj ni estu por la pli granda gloro de Dio kaj por la pli granda utilo de la Eklezio. Dio ĝin meritas, kiel la plej alta Bono; la Eklezio — kiel *la sola en la mondo universala organizacio de vera vivo.* Ĝia fondinto Kristo, estante la Vivo mem, kreis ja ĝin intence, por ke en ĝi kaj per ĝi la homoj *vitam habeant et abundantias habeant.*

Kaj tiu ĉi Krista intenco ne restis senefika. Dank' al la Dia potenco de sia fondinto, la vivo en la Eklezio ne sole aperis kaj konserviĝas, sed ankaŭ estas tre riĉa kaj multforma. Ĝin ja elfaras ne sole homoj-monadoj, apartaj personoj, sed ankaŭ aroj da tiuj ĉi monadoj — la katolikaj nacioj, kiuj estante videblaj ĉefpartoj de la Eklezia organismo, vere povas esti nomataj la membroj de l'Eklezia korpo.

Dank' al tiu ĉi mistika rilato, la Eklezia vivo aperas precipe en la vivo de katolikaj nacioj. Se ili vivadas laŭ Dia volo, konfesante sian dependecon de Li, ŝatante la alportitan de Kristo religian veraĵon kaj moralajn normojn, kaj tiamaniere organizante sian vivon laŭ principoj de Dia *Logoso*, ili fariĝas sanaj, fartas bone kaj ekscitas en la Eklezio la senton de ĝojo. Male se iu nacio agadas nur laŭ propra egoismo, se ĝi el la materiala kulturo kaj bonstato faras idolon, tute nezorgante pri la religiaj devoj, pri la eternaj problemoj de l'spirito, pri la Diaj normoj de l'vivo, ĝi iom post iom komencas sin disorganizadi kaj falante en socian *ĥaoson* pli aŭ malpli rapide alproksimiĝas al nacia malforto, malsano kaj eĉ fina pereo, kaŭzante per tio al la Eklezio la senton de ĉagreno kaj de doloro.

Tial du principoj — la absoluta principo kaj fonto de l'saĝo — la *Dia Logoso*, kaj la absoluta principo kaj fonto de malordo kaj de absurdo — la *infera ĥaoso* estas kvazaŭ du polusoj, inter kiuj konstante sin movadas la vivo de katolikaj nacioj, kaj per tio sama — ankaŭ la vivo de la Eklezio Batalanta mem — pro la malperfekteco de ĝia homa elemento. La influo de l'Logoso alportas al ĝi la sanon, la forton, la ordon, la kulturon — kaj eĉ preparas vivon eternan; kontraŭe — la influo de ĥaoso puŝas la katolikajn naciojn al malsano, al malforto, al anarĥismo kaj al barbareco. Tial ĉiu katolika nacio, estante membro de la Eklezio, devas energie batali kontraŭ mortigemaj principoj de socia ĥaoso. Sed kiamaniere?

Antaŭ ĉio oni bezonas bone ekkoni la naturon de la ĥaoso. Prenita abstrakte ĝi estas la sumo de ĉiuj eblaĵoj kaj kontraŭaĵoj samtempe kunekzistantaj kaj per nenio limigitaj aŭ difinitaj. En la ĥaoso ekzistas nenio *nepra*. En ĝi ĉio povas esti aŭ malesti, en ĝi ĉio estas en la *potencio*, nenio en la *akto*. Estante nature „un Grand Peut-Être", ĝi estas egalvalora al „un Grand Rien".

Kiel tia, ĝi estas ĉiam kontraŭa al la *akto*, t. e. al *ordigo*, al organizado. La komencan ĉefĥaoson, la biblian „tohuvabohu" forigis la ĉiupova Logoso, la Dia „Fiat". Sen Li nia mondo havis la eblon tute neekzisti, la korpoj ĉielaj

povis esti de ĉiuj eblaj formoj kaj grandecoj, esti dismetitaj en ĉiuj eblaj interspacoj, moviĝi en ĉiuj eblaj linioj k. t. p. Post la Logosa „Fiat” ĉiuj tiuj ĉi eblaĵoj estis forigitaj. La mondaro eliris el eblaĵaro. La planedoj, estinte apartigitaj de sunoj, ricevis ĉiuj sian propran grandecon, formon, peron; al ĉiu el ili estis difinita la propra orbito kaj la leĝo de movo. Tiamaniere el la malluma *ĥaoso* eliris la bela mondo — *kosmoso*. La komenca „tohuvaboku” sukcese venkita per Dia Logoso ne estas plu videbla *en la ĉielo*. Anstataŭ la ĥaoso, tie reĝas la ordo, la harmonio . . . . Sed *sur la tero?*

Ho ve! Tie ĉi la batalo kun la *socia „tohuvaboku”* estis nur komencita, sed ankoraŭ tute ne finita. Ĉiuj niaj rilatoj — familiaj, naciaj, internaciaj, komercaj, politikaj, religiaj, eklezia j . . . . daŭradas esti ĝis nun sur la vojo, kondukanta de l'komenca ĥaoso al la fina Logoso. Paroli pli detale pri tio ĉi ni ne havas nun la eblon. Por tio ĉi oni bezonus grandajn volumojn anstataŭ malgranda gazeta artikolo. Tial ni kontentiĝos nur tie ĉi per kelkaj malgrandaj konsideroj pri la devaj el nia flanko penoj por forigi pli sukcese la socian ĥaoson el nia katolika vivo.

Ke tiu ĉi vivo ne estas ankoraŭ plene penetrita per la principoj de Logoso, oni ĝin ne bezonos pruvi. Ĝi estas klare per si mem. Ni katolikoj nuntempaj ne estas ja sanktuloj. Iam aperas inter ni eĉ grandaj krimuloj kaj malbonuloj. Kaj inter bonaj katolikoj mem — kiom da malperfekteco kaj malsaĝecoj en la ĉiutaga vivo! Dividitaj je diversaj nacioj, klasoj kaj partioj — ni longe ne similas la unuajn kristanojn, havintajn unu koron kaj unu animon. Estante tre zorgemaj pri si mem kaj siuloj, ni ofte forgesas la devon je aliaj gekatolikoj. El tie — tiom da katolikaj malriĉuloj suferas la mizeron! Tiom da katolikaj infanoj kaj ĝejunuloj pereas el la manko da pano materia kaj spirita! Tiom ankaŭ da izoleco kaj eĉ malamo inter la katolikaj nacioj! Pri la internacia katolika solidareco oni bezonas ankoraŭ multe pripensi kaj multe labori. Antaŭ ĉio ni devus zorgi pri la kreado kaj organizado de multaj *universalaj internaciaj katolikaj asocioj* por komuna bata-

lado kontraŭ la universalaj malhonorigantaj la nuntempan mondon malbonaĵoj en la formo de pornografio, de prostitucio, de alkoholismo, de paŭperismo, de nacia ŝovinismo, de internacia antikristanismo, de politika opresado de katolikoj en diversaj landoj k. t. p. k. t. p. Grandega laboro, bezonanta grandegan ariĝon de katolikaj fortoj. Bedaŭrinde ni ĝis nun sciis plej ofte nur plendi, kvazaŭ *oves dispersae*. Eĉ la grandaj katolikaj nacioj similas al la loĝantoj de unu granda domo. La domo estas vere vastega, havas multajn ĉambrojn, luitajn de loĝantoj. Ili scias, ke ilia domo estas komuna, ke ĉiu el la loĝantoj dependas de tiu sama propraĵulo, sed neniu zorgas pri la najbarloĝanto, neniu volas interesiĝi pri tio, kio okazas post la muro, en la proksima ĉambreto . . . . Ĉu ne vera nia imago? Ĉar kiom ni efektive scias pri la katolika vivo en la alilandujo? Ĉu ni havas rilatojn kun alilandaj katolikaj organizacioj? Ĉu ni zorgas diverslandajn similajn katolikajn organizaciojn kunigi en grandaj internaciaj katolikaj ligoj?! Je tiuj kaj similaj demandoj la plej ofte ni estas devigataj silenti aŭ pro la honto ruĝiĝi. Fakto bedaŭrinda, sed vera. Unuigitaj en Kristo kaj en la Eklezio, ni ordinare restas tutfremdaj al si mem. Ni havas fortojn, sed tiuj katolikaj fortoj pro sia disigiteco ne produktas tiom da bono, kiom ili povus produkti, se ili estus arigitaj. Ni havas sufiĉe grandan kapitalon, sed tiuj ĉi katolikaj milionoj, ne estante deve de ni mem organizitaj, donas plej ofte profiton nur al nekatolikaj bankieroj. Ni havas glorajn scienculojn en ĉiuj branĉoj de l'scienco kaj estis eĉ invititaj de Pio X mem organizi unu grandan „Internacian katolikan asocion por la progreso de l'scienco" (L'association catholique internationale pour le progrès de la science), sed ankaŭ tiu ĉi bela kaj grandioza projekto restadas ĝis nun ne efektivigita. Kaj ĉie ni katolikoj agadas, kvazaŭ ni estus volantaj pruvi la verecon de Kristaj vortoj, ke filoj de tui ĉi mondo estas pli saĝaj ol ni . . . . Niaj kontraŭuloj ne imitas nin en tio ĉi. Ili konstante laboradas, sin organizadas, kovrante la tutan mondon per la reto de siaj universalaj internaciaj asocioj. Tiajn asociojn posedas

masonoj, liberpensuloj, teozofoj, socialistoj, izraelidoj k. a. La nuntempa gazetaro, telegrafo, fervojaro, vaporŝiparo, aerveturado, kaj la Esperanto mem faras la agadon de suprediritaj internaciaj asocioj milfoje pli facila, pli sukcesa kaj per tio sama — pli terura kaj danĝera al nia Eklezio, ol antaŭe. Do ni katolikoj devas maldormi, ariĝi, kaj ekkomenci ankaŭ la organizacian laboron en granda skalo.

Dank 'al Dio la prepara laboro estas jam ĉie komencita. Ne ekzistas iu katolika nacio, kiu ne estus kreinta ĉe si tian aŭ alian nombron da bonegaj katolikaj organizacioj. Kelkaj el ili, kiel la germana „Volksverein", la nederlanda „Boerenbond" k. a. posedas centmiloj da membroj. Tio ĉi estas grandaj fortoj. Nia unua devo estas ilin ekkoni kaj ekstudi la manierojn de ilia agado.

La studado kaj esplorado de diverslandaj katolikaj organizacioj, certe ne povos esti farita sen la ĝenerala esplorado de l' katolika vivo en respektivaj landoj. Ni do havas la devon esplori ĉiujn kondiĉojn ekonomiajn, sociajn, politikajn, naciajn k. a., en kiuj tiu aŭ alia katolika popolo sin trovas. Certe laboro ne facila, bezonanta multe da esploroj kaj studoj. Sed tiujn studojn povas multe faciligi nia kara Esperanto. Dank' al tiu mirinda komunikiĝilo, ni katolikaj esperantistoj povas facile ricevadi la necesajn al ni sciigojn pri la katolika vivo en iu ajn katolika lando. Dank' al alia nia komuna ligilo, la „*Espero Katolika*", ni havas la eblon fari tiujn-ĉi sciigojn koneblaj al ĉiuj. Se tiu-ĉi nia organo farus alvokon al diverslandaj esperantistoj katolikoj, mi estas certa, ke sin trovus almenaŭ po unu nia samideano, kiu konsentus alsendi al la „Espero Katolika" malgrandan artikolon pri la katolika vivo en sia lando, respondantan almenaŭ je la sekvantaj demandoj:

1) Kia estas la nombro da katolikoj en tiu lando? al kiaj nacioj ili apartenas?
2) Je kiom da eparĥioj ili estas dividitaj? Ĉu multnombra pastraro?
3) Kiaj estas rilatoj inter la katolika Eklezio kaj Ŝtato?
4) Kiaj ekzistas katolikaj organizacioj kaj kiel ili agadas?

5) Kiaj estas lokaj malfavoraj kondiĉoj kaj eĉ danĝeroj al katolikismo?
6) Kia estas katolika gazetaro? Ĉu ekzistas katolikaj lernejoj, kaj kiom?
7) Kiaj estas ĉefaj kondukantoj de l' katolika vivo kaj agado?
8) Ĉu estas farataj ĝeneralaj katolikaj kunvenoj kaj pri kio oni diskutas en ili?

k. t. p.

La similaj sciigoj el ĉiuj katolikaj landoj kaj nacioj, estante presitaj en la „Espero Katolika", eble donus ian puŝon al disvolviĝo de l' katolika agado eĉ en tiuj landoj, en kiuj ĝi estis ĝis nun ne tro vivplena. La ekzemplo ja estas ordinare tre infektema. Vidante aliajn sukcese laborantajn sub la katolika standardo, oni siavice ekflamiĝus dirante: povis ĝin fari tiuj kaj aliaj, kial do ne povus ni mem?

Tiuj konsideroj igas min peti la estimatan redakcion de *„Espero Katolika"*, ke ĝi bonvolu enkonduki la konstantan rubrikon pri la katolika vivo en diversaj katolikaj landoj kaj siaflanke inviti la diverslandajn samideanojn al tiu-ĉi utila laboro. Laŭ nia opinio, ĝi povos havi grandan valoron por la estonteco. Ĉar ekkoninte bone la nune ekzistantajn ĉiaspecajn katolikajn organizaciojn *naciajn,* oni povos jam ekkomenci la kreadon de similaj katolikaj organizacioj *internaciaj.* Kompreneble pro sia universaleco kaj internacieco ili devos esti fondataj kun la permeso kaj la beno de la centra Eklezia ĉefestraro.

Kovno 1. IX. '11. P-ro A. Dombrovski.

# Projekto de Eldono de Jarlibro

## PRI LA KATOLIKA VIVO EN ĈIUJ LANDOJ DE LA MONDO.

---

### Pripensoj pro la Artikolo de P-ro Dombrovski.

---

Komenci la novan jarkolekton de *Espero Katolika* per artikolo de famekonata teologo, matematikisto kaj poeto kaj unu el la plej malnovaj Esperantistoj, estas por la legantaro kaj la redakcio antaŭsigno de estonta sukceso.

Kaj la artikolo de P-ro DOMBROVSKI estas tiel aktuala; ĝi montras tiel klare tion, kion bezonas la Katolikoj de nia epoko por sampaŝe marŝi antaŭen kun la cetera homaro; ĝi tiel konvinkige pledas, por ke sur ĉiu kampo de la vivo la Katolikoj internacie sin organizadu: postulo por fruktodona batalo kaj laboro en tiu-ĉi jarcento, naskinta la internaciecon; unuvorte, ĝi tiel ĝustatempe instigas la Katolikojn diversnaciajn, por formeti ilian nezorgemecon pri reciproka kuniĝo kaj kunagado, ke ni vere rajtas diri, ke lia artikolo enirigos la katolikan vivon de la tuta mondo en novajn vojojn. . . . Ne! lia voĉo ne estos voĉo de iu, vokanta en dezerto! Almenaŭ la Katolikoj esperantistaj estas vekiĝintaj, kaj la rimedo de la internacia lingvo — tiu-ĉi alia flugmaŝino de nia tempo — levas nin tiel alte super la bariloj de la naciaj lingvoj, ke ni per ĝi, neĝenataj kaj nemalhelpataj, transflugas la naciajn limojn. kiuj antaŭe disigis la Katolikojn en grupoj tute fremdaj unu al alia. Kiel ni, fratoj katolikaj, povis forgesi, ke ni ĉiuj en la rava naturo de Dio spiras la saman aeron kaj ke nia koro laŭ sama maniero batas por la samaj idealoj, bezonoj kaj interesoj?

***

Efektive! Kiam ni ĉirkaŭrigardas, ni konstatas ĉie, ke al la arbo de la homara vivo energie burĝonas la internacieco. Ĝi vidiĝas ĉiupaŝe, tie-ĉi kaj tie jam fruktigante la naciajn instituciojn, la asociojn sciencajn kaj aliajn. Precipe la scienco moderna jam internaciiĝis sufiĉe plene per kongresoj, kunlaboroj kaj internaciaj oficejoj, kiuj kunligas la

diverslandajn sciencistojn. La moderna scienco, precipe la naturscienco, disvolviĝis potence dum la lastaj kvindek jaroj kaj ĝi prave meritas la admiron kaj respekton de la homoj pro siaj mirindaj eltrovoj kaj progresoj. Sed bedaŭrinde, pro la malreligieco de la plimulto de ĝiaj pioniroj, tiu moderna scienco prezentas sin kiel la ĉiupovo kaj ĉiuscio. Tamen ĝi estas eble pli nescia pri la plej alta kaj supera Scienco ol la plej malcivilizitaj sovaĝuloj. Ĝi tute ne konsciiĝas, ke ekzistas Kreanto, de kiu ĉiu kreitulo kaj kreitaĵo ĉiumomente dependas. Certe, la scienco donus precizan kaj detalan deklaron pri la fenomeno, ke nia tero baldaŭ tute senviviĝus kaj ĉiel mortus, se la viviga suno subite estingiĝus; ĝi deklarus freneza tiun, kiu volus klarigi la vivon surteran kun ĉiuj ĝiaj mirindaĵoj, ekster ĉia influo de la suno radianta. Tamen ĝi kuraĝas aserti, ke la universo, plena je mondvivo, ne bezonu la Eternan Sunon, ĉiumomentan Fonton de ĉiu energio.[1])

---

[1]) GRANDA PROFETO DE NOVA „DIECO".

En Septembro 1911 okazis la unua internacia monista kongreso sub la prezido de la konata ĥemiisto Prof-ro W. OSTWALD, la prezidanto de la germana monista asocio. La Monismo estas la nova nomo de la Malkredo en ĉiuj ĝiaj formoj, kontraŭreligia unuiĝo laŭ iniciato de ERNST HAECKEL.

En tiu kongreso paroladis la ĉefaj monistoj, riĉaj je malplenaj promesoj kaj kavoj vortoj, malriĉaj je bonfaraj donacoj kaj tuŝeblaj faktoj. Inter ili Prof-ro W. OSTWALD, kiu je l'fino de la kongreso fiere malvolvis sian belaspektan pavan voston, dirante: „Mi fermas la unuan internacian monistan kongreson kaj malfermas la monistan jarcenton"; — kaj kiu dum la kongreso aŭdigis sian akran pavan voĉon, deŝirantan la homarajn orelojn. Lia parolado (laŭ iu liberpensa raporto) „estis apoteozo de la Scienco de la Naturo, la sole vera, ĉion ampleksanta scienco . . . . La scienco fariĝu pli kaj pli *la plej alta bono de l'homaro*. La *Dieco,* kiu komence estas estinta la plej alta bono, pli kaj pli disvaporiĝis, ĝis kiam Ĝi hodiaŭ estas anstataŭata per nenio alia krom per la Scienco".

Post la kongreso la kongresanoj vizitis la patron mem de la Monismo: ERNST HAECKEL. Eĉ tiu ĉi, respondante, diris „ke kelkaj teoriaj diferencoj apartigis lin ja de la perforta vidpunkto de Prof-ro OSTWALD". Verdire, la „malkleraj" katolikoj tute samopinias kun

Fakte la moderna scienco, kontenta je si mem, scias nur amaseton da eksteraj faktoj kaj donitaĵoj, kaj nescias la escencon kaj fundamenton de ĉio ekzistanta. Ho jes! ĝi pretendas pedante scii la fundon de l'afaroj; almenaŭ la malreligiuloj fanfaronas kun impertinenta aplombo, ke siaj nuraj supozoj kaj opinioj (ofte produktoj de antaŭjuĝo kaj intence volitaj konkludoj) estas la ekzaktaj, certaj,

---

la klera patro de la Monismo pri la majstra fanfaronaĵo de Prof-ro W. OSTWALD.

La konvertito ANDRÉ GODARD komencas sian bonegan libron: „Le Positivisme Chrétien" per la vortoj: „Multe da homoj de nia epoko opinias, tiel kiel mi tion estis kredinta, ke Katoliko ne povas esti homo klarigita". Lia libro pruvas la malon. Pri tiuj, kiuj ne akceptas Kreinton, li skribas: „Tiam ni devas akcepti, ke la malpli entenas la pli, zero la nombron; kaj ke polvo, kies originon cetere oni ne klarigas, aglomeriĝas *laŭhazarde*, por produkti la mineralon, la kreskaĵon, la birdon, la insekton, la kvarpiedajn bestojn, la etendaĵon *ekvilibrigitan* de la planetsistemoj, la lumon kaj la vivon nervan, la penson homan, lian volon, lian koron! Kia frenezeco"!

Li citas GUSTAV DROZ: „Kion do faras ĝi, via scienco? Ĝi metas etiketojn sur la misterojn, ĝi katalogas siajn nesciaĵojn. Vi komprenas ĉion! Kaj vi eĉ ne scias, kiamaniere naskiĝas ideo en via propra cerbo. Vi verŝu klaran vinon; do diru al mi tute simple, kio estas la peztiro, la pezeco, la lumo, la vibro molekula; kio estas ĉiuj tiuj proprecoj de la materio, kies nomojn vi diris al mi tiel ofte, neniam difinante ilian esencon? Via scienco transsaltas la abismojn, kaj forte kriegas, ke ĝi plenigis ilin".

GODARD diras ankoraŭ: „Tiuj, kiuj neas ĉion, havas kavajn vortojn por maski la teruron de siaj materialistaj sistemoj, popularigitaj de nesciuloj, poste akceptitaj de la nuntempa popolamaso, kiu estas sciencadoranta; senkontrola akceptado de la orakoloj de la Scienco. Unu el ili kuraĝis diri: „Post kiam mi dissekcas la homan korpon, mi en ĝi neniam renkontis animon". Sed kiu studas l'animon, ankaŭ en ĝi neniam trovis muskolojn . . . .

„Infanaĵo la scienco, kiam ĝi direktas siajn sagojn kontraŭ la ĉielo. Misio tre alta, kiam ĝi, kun Newton, Laplace, Cuvier, Chevreuil, Pasteur, Faye, Quatrefages, konfirmas Dion en iu parto elesplorita de la Kosmo."

definitivaj konkludoj de **LA** scienco. Neniel malhelpas, ke la teorioj de *tiu* scienco ŝangiĝas almenaŭ ĉiujn dek jarojn; ke la disvolviĝo de tiu sama scienco ĉiufoje renversigas la ĝustecon de ĝiaj antaŭaj hipotezoj: ili senhonte daŭrigas sian kontraŭreligian agadon, ne rimarkante sian malsaĝecon kaj malpovecon; ĉar ili povas meti kontraŭ la dum miljaroj neŝanĝita kaj neŝanĝebla Vero nur sistemojn, kiuj ŝanĝas ĉiumomente sian nomon kaj enhavon; nur asertojn, kiuj senĉese variiĝas kaj aliiĝas.[2])

Jen de tempo al tempo iu internacia kongreso subite konigas tra la tuta mondo la novebakitajn „solvojn de la scienco" (tiel la malreligiaj scienculoj kutimas nomi siajn elpensaĵojn); tuj poste duarangaj „kleruloj" en ĉiuj naciaj popularigas tiujn unutagajn hipotezojn kiel eternajn leĝojn de dio-naturo.

---

[2]) HOMARPRAPATRO SIMIO REFARIĜIS SIMPLE . . . . SIMIO.

Mi ricevis en Septembro 1911 prospekton de granda eldonisto de sciencaj verkoj: GUSTAV FISCHER en Jena (Germanujo); ĝi estis enmetita en grava germana kuracista revuo. Ĉar tiu prospekto do estis destinita por serioza kaj scienca legantaro, la eldonisto openiis necese, klare montrigi la seriozecon de la anoncita verko, spite ĝia titolo: „Die Abstammungslehre" (La doktrino pri homa origino). Mi citas jenajn rimarkindajn frazojn el la teksto de tiu rekomenda prospekto (mi substrekis kelkajn):

„La doktrino pri homa origino okupas ankoraŭ ĉiam la ĉefan lokon en la naturscienco, kvankam jam pasis duonjarcenton de post la sensacia verko de DARWIN. Se ĝi ja kelkatempe malprogresis, *precipe kaŭze de troo da teoriaĵoj kaj fantasiaj designaĵoj* (designitaj figuroj), tamen ni nun vivas en epoko, en kiu oni pli ol iam laboras al la ekzakta konstruo de tiu doktrino. Per tiuj ĉi modernaj esploradoj *sendube la aspekto de la origindoktrino treege aliiĝis. Spite tio la populara literaturo ankoraŭ ĉiam moviĝas en la vojoj de la komenca Darwina epoko,* tiel ke la progresavidaj laikoj apenaŭ aŭdas ion pri la plua elfaldiĝo de la doktrino, pri la bataloj de la lastaj tempoj. *Ĉar ja la plejmulto de la popularigantoj precipe de tiu ĉi materio estas tute fremdaj al la viva esplorado de la scienco.* . . . GOLDSCHMIDT instruas nin la malfacilan fakon de la moderna doktrino pri herediteco, *kiu komencas anstataŭi la malnovajn fundamentojn de la doktrino*

Kaj senĉese ĉiuspecaj ĵurnaletoj kaj libretoj ripetadas senkontrole tiujn senfundamentajn frazojn kaj nutras kaj saturigas per tiuj malsciencaĵoj kaj malveraĵoj la popolon, adoranton de ĉio, sur kio oni gluas la etiketon: scienco.

---

*pri homa origino. . . .* En la doktrino pri la ŝtoniĝoj, kiu estas tiel grava por l'origindoktrino, *la originteoriaj vidpunktoj suferas revoluciajn sanĝiĝojn. . . .*"

Kaj la eldonisto finigas sian prospekton jene: „Tiele tiu ĉi libro okupas tute specialan lokon, kaj precise pro la priskribo de la vidpunktoj de diversaj, *treege seriozaj,* scienculoj, ĝi baldaŭ treege estos ŝatata de tiuj ĉiuj, kiuj nepre deziras havigi al si *fidindan kaj ne tro hipoteze koloritan scion* pri la doktrino de homa origino laŭ ĝiaj plej modernaj rezultatoj".—

El tiu ĉi prospekto, en kiu la eldonisto pro sia propra intereso *sincere* konfesas la veron (kompreneble interkonsente kun la 11 scienculoj-verkistoj), mi konkludas jenajn:

1-e ke la naturscienco senĉese ege variiĝas kaj aliiĝas.

2-e en la okuloj de la sciencularo mem la origindoktrino perdis sian sciencecon kaj seriozecon tiugrade, ke estas necese, por ke scienculoj aĉetu verkon pri tiu temo, ke oni konfesu la malsciencecon kaj malseriozecon de pli fruaj verkoj pri la sama temo.

3-e ke vere la originteorio havas nun tute alian aspekton ol je la tempo de DARWIN kaj poste. Plue, ĉu i. a. *Ernst Haeckel mem* (pri kiu ĉiu scias, ke li estas la aŭtoro de la „fantasiaj designaĵoj" pri kiuj la prospekto parolas kiel pri fakto pruvita) ĉu ne HAECKEL mem diris en sia parolado, legita dum la monista kongreso, ke la homo ne devenas de konataj bestoj, *do ne de simio?* Nunmomente HAECKEL devenigas la homon de „tre longa serio da estingiĝitaj vertebratoj . . . . antaŭ multaj milionoj da jaroj". — Do, enterigu ni nian prapatron, la simion!

4-e Ke la agado de la kontraŭdarwinistoj (la Jezuito E. WASMANN k. m. a.) havis grandegan efikon en la senpartia kaj serioza mondo scienca; inter si la scienculoj sincere konfesas, ke la teorio de DARWIN pri homa origino estas malvenkinta.

5-e Ke en 1912 ankoraŭ oni ĉie daŭrigas instrui al la amaso la belajn hipotezojn de l'antaŭa jarcento pri nia deveno el simio k. t. p. kaj ke ĉiuj tiuj homoj estas plej grandaj nesciuloj pri la hodiaŭa stato de la sama scienco, kiu pli frue donacis al ili la enviindan honoron, fiere akceptitan, esti infanoj de simio, anstataŭ infanoj de Dio,

Tiuj ĉarletanoj! Anstataŭ verajn rezultojn de la senpartia scienco, ili vendas *nur* la *partiajn asertojn de senreligiaj scienculoj.*

Ĉu ne okazas io simila en Esperantujo? La batalo kontraŭ la Esperantismo multrilate tiel similas al la batalo kontraŭ la Katolikismo, ke mi ne pli klare povas komprenigi la situacion ol per jena komparo.

Ni havas tri specojn da kontraŭesperantistoj:

1e. La ne-esperantistaj *scienculoj*, ofte veraj scienculoj, kaj la ne-esperantista publiko, kiu ĵuras pri ĉio, sur kiu oni gluas etiketon: la scienco.

Tiuj scienculoj, nenion konante pri Esperanto krom tio, ke ĝi estas artefarita kaj internacia lingvo, tuj kun la plej *granda nescieco* pri la afero — do laŭ plej malscienca maniero — eldiras la plej malsaĝajn frazojn, refutitajn jam kvaronjarcenton per la faktoj (ekz. ke arta lingvo estas ne ebla, ke en ĝi la homoj ne komprenados unu la alian, ke ĉiu popolo uzados ĝin alie, ke en ĝi oni nenion povas esprimi, ke ĝi mortigus la naciecon, k. t. p.) Ili proponas siajn frazojn kiel nerefuteblan rezulton de logika rezonado kaj kiel *konkludojn de la scienco!*

2e. La *reformistoj,* tiuj kiuj libere pensas, kiuj posedas inklinon al *sendependeco*, kiuj nepre ne povas sin submeti al iu aŭtoritato, kia ajn prava kaj rajta kaj necesa kaj laŭprudenta ĝi estu. Ankaŭ ili motivas sian agmanieron pro la *postuloj de la scienco.* Ilia ambicio kaj aroganteco blindigas ilian prudenton kaj enirigas ilin en novajn vojojn, kondukantajn al anarĥio kaj ĥoaso.

3e. La *senfideluloj*, kiuj kun *fanatika malamo* persekutas siajn antaŭajn samideanojn, kaj estas la instigantoj kaj fidelaj helpantoj de la du aliaj specoj da kontraŭesperantistoj. Ili nur kaŭzas sian propran ruinon.

Jen ankaŭ la tri kategorioj de kontraŭ-katolikaj homoj. Religia nescieco (plej ofte ĉe scienculoj), religia sendependeco, religia nefideleco kun fanatika malamo de apostato.

Kaj tiuj ĉiuj kun enviinda fervoreco internacie propagandas la *doktrinon de malreligiaj scienculoj* (erarige proponitan kiel la doktrino *de la Scienco*).

***

Ĝenerale ni, Katolikoj, daŭrigas nian malnovan manieron de agado kaj memdefendo kontraŭ la nova fortego de malreligia internacieco; armitaj je malsimilaj armiloj, tro mallongaj kaj nesufiĉaj por trafi la kunigitajn popoltrompistojn, ni izolitaj malŝparas niajn fortojn. En ĉiu nacio ni ja admiras katolikajn pionirojn, kiuj en sia ĉirkaŭaĵo kuraĝe defendas la Eklezion kontraŭ tiuj atakoj.

Sed kion ili valoras kontraŭ la plenmano da internacie organizitaj malamikoj kun ilia armeo da ĉiulandaj propagandistoj, kontraŭ kiuj ili ne havas taŭgajn defendilojn? Rajdante sur ĉevalo, ili persekutas malamikon, kiu rapide ĉirkaŭflugas en aeroplano.

La Katolikoj ne maltrankviliĝas pri siaj katolikaj fratoj loĝantaj en aliaj ĉambroj de la katolika Domo. „Ili ne volas interesiĝi pri tio, kio okazas post la muro en la proksima ĉambreto”,skribas P-ro DOMBROVSKI. „Kion utilas,” li aldonas, „ke ni plej ofte nur scias plendi kiel *oves dispersae*” (ŝafoj disigitaj). Kaj Episkopo PELCZAR demandas en sia belega parolado (vidu artikolon de P-ro SZUREK): „Ĉu sufiiĉas sole preĝadi? . . . Do pro la fervorega agado de malamikoj estas necese montri pli da agado de l'katolika flanko”. — Sed, mi aldonas, agado konforma kaj proporcia al ilia agado, t. e. ni devas *aldoni* al nia ĝisnuna regiona, nacia agado la internacie organizatan agadon. Mi ripetas la vortojn de P-ro DOMBROVSKI: „Antaŭ ĉio „ni devus zorgi pri la kreado kaj organizado de multaj „*universalaj internaciaj katolikaj asocioj* . . . . Ĉu ni zor- „gas diverslandajn similajn katolikajn organizaciojn kunigi „en grandaj internaciaj ligoj? . . . . Ĉar ni, katolikoj de „iu ajn nacio, estas veraj fratoj en Kristo, ni ja havas „*gravan devon de universala internacia katolika solidareco*, „ne sole en la kredo, sed ankaŭ en ĉiuspeca agado — „socia, scienca, komerca k. t. p. . . . . Ĉio, kio rilatas la „katolikan vivon en diversaj landoj, devas nature nin in- „teresi, kiel io al ni mem propra kaj proksima”.

Kaj P-ro DOMBROVSKI ne kontentigas sin je vortoj, li aldonas praktikan rimedon por diskonigi la katolikan vivon

de ĉiu ajn nacio tra la tuta mondo. Li proponas praktikan komencon.

Nebezone diri, ke mi varme aplaŭdas la proponon de P-ro DOMBROVSKI. Tamen mi kuraĝis proponi al li iomete alian aranĝon de l'afero. Mi detale skribis pri tio, kaj mi nur citos lian respondon: „Mi volonte aprobas vian pro- „jekton pri la „tutmonda jarlibro" kaj permesas aldoni al „mia artikolo ĉiujn rimarkojn, kiujn vi trovos necesaj. Kiel „redaktoro, vi havas eĉ la rajton mallongigi mian artikolon. „Ni ja devas fari ĉion plej bone, por la plej granda gloro „de Dio".

***

Jen mia intenco:

1-e. En 1913 mi eldonos „*Jarlibron pri la katolika vivo en ĉiuj landoj de la mondo*". Ĝi estos spegulo de la agemeco kaj kunlaboremo de la Katolikoj Esperantistaj. Ĝi estos taŭga rimedo, por ebligi facilmaniere internaciajn interrilatojn kaj organizadojn, konigante jam ekzistantajn asociojn kaj instituciojn ĉiuspecajn, iliajn estrarojn (adresojn) kaj *mallonge* iliajn celon, laborojn kaj rezultatojn. Ĝi donos statistikon kiel eble plej diversmaterialan pri la Katolikismo kaj ĝiaj efikoj. Ĝi do ne estos jarlibro pri katolika Esperantismo, sed jarlibro pri la tutmonda Katolikismo. Ĝi estos utila, ne nur al Esperantistoj, sed ankaŭ al ĉiuj progresemaj pioniroj katolikaj, eĉ ne-esperantistaj. Kvankam la teksto estos Esperanta, tamen en ĉiu lando oni povos englui „ĉefeĉan ŝlosilon" en nacia lingvo, kaj tiamaniere ĝi fariĝos uzebla por ĉiu ajn. Nebezone diri, ke ĝi samtempe estos granda propagandilo, ne nur por Esperanto ĝenerale, sed precipe por nia I. K. U. E. speciale.

Mi do insiste petas miajn samcelanojn, alsendi al mi *antaŭ la 1-a de Julio 1912* siajn donitaĵojn kaj raportojn pri la katolika vivo en sia lando; oni alsendu ankaŭ naciajn katolikajn jarlibrojn aŭ aliajn librojn aŭ revuojn, el kiuj mi povus ĉerpi bezonan materialon. Krom Holandajn, Francajn, Anglajn kaj Germanajn librojn, oni alsendu ankaŭ alilingvajn librojn, nur aldonante tradukon de vortoj, kiuj estas nekompreneblaj por Esperantisto, aŭ de tiu

teksto, kiu precipe estas grava por nia jarlibro. Estas necese, ke en ĉiu nacio, kiu partoprenos, la katolikoj konsiliĝos inter si, kiuj kaj kiamaniere ili kunlaboros.

Pri la Nederlanda fako mi zorgos, kaj ĝi estos modelo, por ke aliaj nacioj povu imiti ĝin okaze de postaj eldonoj de la jarlibro.

Kiam iuj nacioj ne kunlaboros, ili ne malhelpos la eldonon de la Jarlibro; nur ili estos la kaŭzo, ke ĝi estos nekompleta kaj ke ili mem provizore staros ekster la internaciaj organizaj klopodoj, kiujn kaŭzigos la eldono de la Jarlibro: propra kulpa eksterstaro pro tio, ke iliaj asocioj kaj adresoj daŭras esti nekonataj.

2e. Ni enkondukos en *Espero Katolika* la rubrikon: *La Katolika Vivo en ĉiuj nacioj.* En tiu rubriko ni presigos artikolojn de internacia intereso pri modelaj kaj gravegaj asocioj naciaj. La Jarlibro enhavos multdetalajn *resumojn ĝeneralajn*; la Rubriko *priskribajn artikolojn pri speciala temo.* Krom tio, ni presigos en tiu rubriko interesajn faktojn el la alsendita materialo por la Jarlibro.

* * *

*Nekonata, neamata,* diras Nederlanda proverbo.

Hontiga estas nia nescieco pri nia propra katolika vivo. Kie estas nia solidareco, nia interesiĝo pri la diverslanda katolika vivo? — Tio ŝanĝiĝu!

Pro tio, karaj gelegantoj, kunhelpu por konigi kaj do amigi niajn proprajn kaj proksimajn fratrojn en Kristo kaj ĉion, kio rilatas al ili. Kunlaborante al la Jarlibro, vi havigos al la katolika mondo la bezonan rimedon, por ke fine ankaŭ la katolikoj ĉie povu plifortigi kaj plivalorigi sian nacian agadon per universala internacia organizado.

Unueco donas fortecon.

D-RO SMULDERS.

# IIa MARIANA KONGRESO

## (OKAZINTA DUM AŬGUSTO 1911 EN PRZEMYS'L)
## (GALICIO—AŬSTRIO.)

---

Samtempe kiam la malamikoj de Krista Eklezio kune kun la estro de framasonaro aranĝas en Romo la malpiegan demonstracion kiel apoteozo de la sakrilega rabo t. e. rabo de „Petra Patrujo", tiam Poloj, la ĉiame fidelaj infanoj de Eklezio, kunvenas sub prezido de siaj Ĉefpaŝtantoj por defendi la sanktan kredon, kaj ĉiujn tiujn la plej karajn trezorojn, kiuj estis, estas kaj ĉiam estos la fortika fundamento de pola naciekzistado. — Je alvoko de Ekscelenco Lia Altŝatinda kaj Althonorinda Episkopa Moŝto D-ro. Joseph Sebastiano PELCZAR (Pelĉar), Episkopo en Przemys'l (Pŝemys'l) estis kunvenintaj en ĉi tiu urbo multaj polaj katolikoj por partopreni en la dua kongreso aranĝita je honoro de la Sankta Virgulino. Estis alvenintaj 8 Episkopoj el tuta pola lando Galicio, ĉiuj laikaj eminentuloj, aŭtoritatuloj, ĉefestroj de landaj institucioj, multaj gesinjoroj el aristokracio, nobelaro, inteligentularo, multnombra urbanaro, vilaĝanaro kaj laboristaro. Oni povas diri, ke en ĉi tiu kongreso mankis nenia profesio, nenia klaso de pola nacio. Ĉeestis pli ol 16.000 da personoj. Ĉi tiu dua mariana kongreso pruvas, ke la ideo de „marianaj kongresoj" depost la unua okazinta en **Lvovo** (ĉefurbo galicia) en 1904, okaze de 50a datreveno de proklamo de katolika dogmo pri la „Senmakula Konceptiĝo" de Sankta Dipatrino, ĉe pola nacio pli kaj pli kreskadas, disvastiĝas kaj populariĝas. Ĉi tiun marianan kongreson oni povas nomi simple „katolika" kongreso, ĉar en ĝi efektiviĝis la ekzameno kaj esploro de ĉiuj fortoj, **de la tuta katolika agado en nia lando,** kaj oni informiĝis pri laboro kaj batalado por la plej karaj trezoroj de polaj animoj. Kiaj temoj estis pritraktitaj en ĉiuj kongresaj kunsidoj plej bone montras la belega programa parolado, farita de la tre elokventa epis-

kopo PELCZAR je la solena malfermo de kongreso, parolado, kiun mi tutan, fidele tradukitan el pola lingvo en esperanton, metas ĉi sube:

„Estu gloro al Plejsankta Triunuo! Estu honoro al Sankta Dipatrino Maria! Jen kun tia devizo sur mia buŝo mi salutas Vin, la Altrespektindaj Ĉefpaŝtantoj de tri ritoj (latina, greka kaj armena), vin, laikaj eminentuloj, vin, reprezentantoj de ĉiuj katolikaj societoj, kaj vin, estimata kongresanaro! Dum la unua kongreso mariana, okazinte en 1904 en Lvovo, mi esprimis deziron, ke la sekvonta kongreso okazu en Varsovio aŭ Poseno (Polujo germana) sed, ĉar ĉi tiun ĝojan momenton ni devas ankoraŭ atendi, do nia antikva urbo Przemys'l, entenanta en siaj muroj du miraklajn pentraĵojn de Sankta Virgulino solene kronigitajn, ekĝuu unue ĉi tiun feliĉon! — Por kio ni estas aranĝintaj ĉi tiun kongreson? Jen, unue por fari la plej humilan submetiĝon al Sankta Virgulino kaj plej kara Patrino, kiun ni Poloj nomas ĉiam „Reĝino de Polujo", due por denove konfesi, ke ni Poloj estas ĉiam Ŝia popolo, Ŝia servistaro, Ŝia infanaro, ke ni nuntempe vivantaj ne kun malpli granda honoro ol niaj praavoj, humuliĝas antaŭ Ŝiaj piedoj, kaj alproksimiĝas al Ŝia koro. Ho ve! ĉi tiu nia plej kara Reĝino estas bedaŭrinde — kiel vi ĉiuj scias — suferinta antaŭ nelonge en Czestochowa (Ĉenstoĥova) en monaĥejo, nomita sur „Jasna Góra" (Klara Monto), teruregan ofendon de unu el Ŝiaj ministroj, do por rekompenci ĉi tiun grandan krimon kaj ankaŭ Ŝin pardonpeti por la malpiegaj „Legendoj" de Niemojewski (liberpensula literaturisto, kiu skribis blasfeme pri Dipatrino), por rekompenci la herezon de „Mariavitoj" (hereza sekto en ruslanda Polujo), por pekoj de la tuta pola nacio, ni morgaŭ ĉiuj komune komuniiĝos, kaj hodiaŭ dum la tuta unu horo adoros la Plej Sanktan Sakramenton. Jam hodiaŭ ni metu humile kaj pardonpete niajn korojn antaŭ la mirakla bildo de Sankta Dipatrino. Ho! ekfluu kaj ĉiam fluadu el niaj koroj la konstanta himno de l' honoro, de l' amo al ĉiela trono de nia Reĝino kaj trafluinte tra Ŝia koro ĝi iru al la Seĝo de la „Senmorta Reĝo de jarcentoj"!

Ni ĉiuj estas kunvenintaj el diversaj partoj de Polujo por petegi ĉi tie la diajn gracojn por ni mem, por niaj familioj, por tuta nacio, kaj precipe elpeti la konstantecon en katolika kredo, la persistecon en pia laboro, la kuraĝon en batalo, la paciencon kaj harditecon en niaj suferadoj, la spiriton de abnegacio kaj oferdonemo por ĉiuj sacerdotoj kaj fideluloj; kaj ĉi tiujn preĝpetojn ni devas meti en manojn de la sankta, dolĉa kaj potenca Maria, ke Ŝi ilin oferu al Plej Sankta Koro de Jezu-Kristo. Oni estas iam dirinta, ke Dipatrino ĉiam staras ĉe la ĉiela pordego kaj rigardas ĉien, ĉu ie ne fluas larmoj, kaj aŭskultas, ĉu ie ĝemas koroj, por tien sendi Ŝian kuraĝigon; kaj kie — mi demandas — oni vidas pli da larmoj fluantaj, kaj kie oni aŭdas pli da koroj ĝemantaj ol en Polujo? Jen, sur ĉi tiun nacion Maria kun precipa amo rigardas! Ŝi ja ne ĉesis ĝin regi! Do estas necese vivigi en nia nacio la piecon al Sankta Virgulino kaj disvastigi ĉi tiun „invokacion" (alvokon) de ni Poloj de jarcentoj uzatan kaj freŝdate aprobitan de Lia Papa Moŝto: „Reĝino de Polujo, preĝu por ni". Estas necese ĉiam voki al Ŝi kun plena konfido:

„Reĝino nia Vi, Sankta Maria:
Ni Poloj estas regataro Via"!

Suferplena estas la sorto de nia nacio, ĉar — ni devas konfesi — grandaj estis kaj estas ĝiaj kulpoj, sed per propeto de ĉiela Reĝino alvenos — mi kredas forte — al ĝi la momento de Dia favorkoreco kaj savigo same, kiel ĝi estis alveninta iam el „Jasna Go'ra" (klara Monto) dum la regado de nia pola reĝo Johano Kazimiro. Kun tiu sankta espero, kies plenumon la sekvontaj ĝuos generacioj, ni entombiĝos! Dio ja estas senlime justa kaj favorkora!

Ĉu tamen nuntempe sufiĉas sola preĝado de ni? Ne! ĉar ni Poloj estas kiel tiuj Izraelidoj post babilona mallibereco, kiuj, starigante denove la murojn de Jeruzalemo, per unu mano konstruadis, kaj per alia bataladis kontraŭ malamikoj, samtempe levante siajn animojn al Dio! Same estas necese, ke ni ankaŭ ne nur preĝadu, sed laboradu kaj bataladu! Ni rigardu nun la katolikan mondon! Efektive, multe da bonaĵo ekzistas en ĝi, kaj pro tio ĝojegas

la kredanta animo, sed bedaŭrinde ekzistas ankoraŭ multaj danĝeroj, tiel, ke ŝajnas esti nuntempe plenumata „vizio” de la apostolo, kiu vidis la profundan puton kaj eliradantan el ĝi grandan nigran nubon da akridaro por mallumigi la brilon de l'suno kaj ekmanĝegi la fruktojn de l'tero! Hodiaŭ devas Eklezio bataladi ne nur kontraŭ herezo, apostateco, sed ankaŭ kontraŭ publika kaj obstinega ateismo organizita en diversaj asocioj kaj sektoj, kiuj volus estingi tute la lumon de religio, kaj nuligi la multjarcentajn fruktojn de la kristana vivo. Sur la fronto de tiuj malamikoj staras la **framasonaro,** malamiko simila al satano, ĉar ĝi agadas kaŝe, sed hodiaŭ, jam plifortiĝinte, ĝi pli kaj pli publike laboras, kaj en Romo mem aranĝas kongresojn. La framasonaro estas la potenca malamiko, ĉar ĝi estas fortigata per la kontrakto kun ĉiuj malamikoj de Eklezio, precipe kun la erariga filozofio, kun la partioj liberpensula, socialista, kun la ribelemuloj. Ĝi estas sagacega kaj uzadas en sia agado diversajn armilojn. La framasonaro kontraŭbatalas Eklezion diversmaniere, kaj nome: ĝi, helpata de siaj amikoj, aŭ okazigas en parlamentoj la dividon inter Eklezio kaj ŝtato kiel ekzemple en Francujo, aŭ ĝi kaŭzas la anarĥistajn tumultojn, ribelojn kiel ekzemple en Barcelono, Lisbono, aŭ ĝi dissemas en mondo jenajn devizojn: *a*) batalado kontraŭ katolika pastraro *b*) defendo de senreligia lernejo *c*) defendo de la sendependa etiko *d*) defendo de la neracia emancipado virina *e*) postulado de la bruligado de la kadavroj k. t. p. Samtempe ĝi laŭ la konsilo de **Quinet** klopodas sufoki la katolikismon en la koto de mensogo kaj kalumnio, kaj la homaron tiel forte okupigi per la kulto de l'karno kaj materiala progreso, ke ĝi ne havu sufiĉe da tempo por pensadi pri Dio mem! Unuvorte la framasonaro ĵetas en la mondon grandajn faskojn de la ateismo kaj malmoraleco inter la inteligentula klaso, kaj ree la socialismo deprenas la kredon al laboristaro. Hodiaŭ la liberpensulaj kaj framasonaj gazetoj postulas pli kaj pli forte, ke oni elĵetu el Romo„ la vatikanan Malliberulon” trans la marojn kaj tute enterigu la katolikismon; kaj nelonge antaŭe unu el adeptoj de framasonaro, nome

DELPECH, ne hezitis publike eldiri jenaĵon: „La regado de la Galileano daŭradis dum 20 jarcentoj, sed ĝi certege finiĝos!” Ho! tro frua estas via ĝojo! vi malpiegaj filoj de Juliano apostato! Vi povas derabi Eklezion, ĝin malliberigi, eĉ en katakombojn ĵeti kaj turmentigi, sed vi ĝin ne sukcesos venki, ĉar ni hodiaŭ kuraĝe diras: „Mori possumus, sed vinci non possumus” (Ni povas morti, sed ni ne povas esti venkitaj), kaj vi ĉiuj satanaj filoj pli aŭ malpli frue nepre estos vokotaj: „Vicisti Galilee!” (Vi estas venkinta Galileano!)

Kaj ĉe ni Poloj, kiel estas nuntempe sur la religia kampo? De aluvio de multaj kaj diversaj malfeliĉoj kio estas elliberiginta nian nacion? **Jen la amo kaj obeo al katolika religio!** Kaj la voĉo de vera patriotismo memorigas nin ĉiam, ke la katolika religio estas por patrujamo la plej viviga, forta fundamento kaj certega garantio de la reviviĝo. Estu do dankego al Dio por tiu favorkoreco super nia nacio! Sed mi demandas — ĉu hodiaŭ minacas nenia danĝero al kredo de pola nacio? Ho malfeliĉe! ĝi minacas kaj minacas treege! Preterlasinte la atakojn de protestantismo kreanta en Wielkopolska (parto de Polujo en Germanujo) pli kaj pli novajn postenojn, preterlasinte la ortodoksismon penanta per helpo de rusa registaro kaj hodiaŭ per helpo de „mariavitismo” frakasi la katolikismon, mi rimarkigas Vin, ĉiuj kongresanoj, je la semiĝado de positivismo aŭ plivole de publika ateismo aperanta en Varsovio; je tiu senreligia revuo varsovia „Zaranie” („Mateniĝo”) kaj aliaj gazetoj ĉu asocioj, portantaj al pola popolo la sendian kulturon; je tiuj al katolika kredo malamikaj asocioj de „la sendependa penso” de „la senreligia kulturo”, de „etikaj rondoj” kaj aliaj, kiuj ĉiuj povas esti konsiderataj kiel fronta batalantaro por framasonaro; je tiuj malmoraligaj verkoj de niaj „dekadentuloj kaj dekadentulinoj”; je tiu kontraŭ-religia, kontraŭ-sociala kaj kontraŭnacia laborado de socialista partio, direktata ordinare de hebreoj; je tiuj teruregaj mortigegoj au rabadoj, farataj de senreligiaj laboristoj; je tiuj liberpensulaj gazetoj, ĉiam kalumniantaj la pastraron; je rebelema spirito blovanta

inter la universitata junularo; fine je tiu materialismo, disvastiĝanta pli kaj pli en teorio kaj praktikeco. La propagando de la malpieco fariĝas iom post iom pli kuraĝa! Ĉu do oni povas miri, ke en tia stato eble tiu aŭ ĉi tiu pola animo deturnas sin de Dio kaj Religio? Antaŭ 100 jaroj ekzistis en mondo libertinoj, framasonoj, amasoninoj kaj „mopsinoj", sed multaj el ili ĉiuj ĉeestadis la sanktan Meson, konfesadis siajn pekojn antaŭ morto! hodiaŭ ree ne nur inter kleruloj ĉu viraj, ĉu virinaj, sed ankaŭ en laboristaj sferoj aperas malkaŝaj, publikaj ateistoj, kiuj altrudas al si mem opinion, ke Dio ne ekzistas, kaj ateistoj praktikaj, kiuj tiamaniere vivas, kvazaŭ Dio ne ekzistus! Estas terurega okazintaĵo, ke multaj lernantoj ĉu gimnaziaj ĉu universitataj perdas la kredon, kaj tion kompreneble nepre sekvas la maldisciplino, malmoraleco, etika nihilismo, ekpereo de la patrujamo kaj de l'estimo al idealoj, unuvorte la tuta difekto kaj infekto de l'animo kaj korpo. Malbono enpuŝiĝas ĉien kiel „dĵuma" tiel, ke eĉ en la pastraro mem tie aŭ ĉi tie ekaperas spirito de Lucifero vokanta laŭte: „Non serviam" (Mi ne obeos), kiel ekzemple ĉe la „mariavitaj" pastroj aŭ „nedependaj" pastroj en Ameriko!

Kaj kontraŭ ĉio tio malbona ĉu batalas la katolikaro? La vilaĝa popolo havas multe da religiaj sentoj, sed ankoraŭ tro malmulte da katolika konscio, kaj same oni devas diri pri la laborista klaso. Inter kleruloj ekzistas multaj katolikoj kun plena „konvinkiĝo" kaj praktikantaj katolikan kredon, zorgantaj pri ĉiu dia afero, pretaj por oferoj el penoj kaj monoj, helpantaj siajn pastrojn en iliaj laboroj. Parenteze dirite, en unuaj vicoj de katolika laborado iras ĉiam polaj virinoj! Sed flanke de fervoraj katolikoj ekzistas ankoraŭ katolikoj malagemaj, kiuj volonte preĝas kaj petas eĉ miraklojn de l'ĉielo, kiuj tamen ne prenas sur sin la taskon labori en katolikaj societoj kaj precize fermas sian monsaketon! Ekzistas katolikoj timemaj, kiuj volus agi katolike, sed tro atentas tion, kion pri ili povus la mondo diri, aŭ gazetoj skribi! Ekzistas katolikoj malkonsentaj, kiuj katolikismon volus monopoligi

por sia klaso aŭ partio kaj malvolas labori kun „nesciuloj". Ekzistas katolikoj suspektemaj, kiuj plendas dirante, ke la pastraro nenion agas krom en la preĝejo, sakristio, kaj se ĝi (pastraro) eliras el sakristio por labori publike sur sociala kampo, ili tuj vidas en tio „klerikalismon" aŭ „demagogion". Ekzistas katolikoj ne zorgemaj, kiuj ne klopodas por ekkoni funde la katolikan kredon kaj plenumadi fidele la religiajn devojn, kaj la taskon zorgi kaj subteni spiriton de l'kredo kaj kristanaj moroj, ili metas tion sole sur la pastraron, kvazaŭ religio ne estus la propraĵo de ĉiuj (do ankaŭ de laikuloj!) Ekzistas katolikoj falseopiniantaj, kiuj la religion ĉiam metas sur la lastan lokon (post patrujo, post scienco, post progreso) forgesante pri tio, ke, se religio ne estas al ia animo la „unuaĵo kaj plej karaĵo", ĝi tiam nenion valoras al animo! Ekzistas katolikoj „festaj", kiuj nur dum kelkaj solenaj festoj vestiĝas per katolika vesto (ĉeestas en preĝejo), kvazaŭ per frako aŭ „kontuŝ" (pola aristokracia vesto). Ekzistas eĉ tiaj katolikoj, kiuj volus korekti la katolikajn dogmojn kaj plibonigi la institucion de Krista Eklezio. Ekzistas katolikoj kiuj fanfaronas, ke ili estas katolikoj, sed vivas laŭ la paganaj principoj. Kion do valoras ĉu antaŭ Dio, ĉu antaŭ homoj tiaj katolikoj? Certege nenion! Do pro la fervorega agado de malamikoj estas necese el flanko de katolikoj montri pli da fervoro, pli da oferdonemo por katolikaj aferoj, pli da kuraĝo en la batalado, pli da apostolado kaŝa kaj malkaŝa, publika kaj privata. Antaŭ ĉio ĉiuj katolikoj klopodu, penu ekkoni ĉiujn siajn nuntempajn devojn, kaj tion, kio minacas al ilia kredo, ĉar estus grandega eraro procedi laŭ „struta" metodo, t. e. fermi okulojn por ne vidi danĝeron! Ne! Ni ekkonos la malamikojn de Dio kaj animoj, kaj hodiaŭ t. e. dum kongreso ni interkonsiliĝados pri tio, kiamaniere ili povus esti venkitaj aŭ se eble konvertitaj, kaj per tio plifortigi en nia nacio la spiriton de l'kredo.

Sur la kampo de la moraleco, de familia vivo kaj edukado ni rimarkas flanke de bonaj moroj ankaŭ la antikvajn polajn malvirtojn, novajn kaj malbonajn influojn irantaj el

eksterlando; kaj nome: la penadon por enkonduki anstataŭ honoron al Dio la kulton al homo, anstataŭ leĝon de Dio la framasonan etikon, anstataŭ kristanan idealon de la edziĝo kaj familio la „laikajn" edzkontraktojn kaj edziĝdisrompojn aŭ liberan amon kaj ne briditan erotismon, aŭ la teorion de Malthus kaj neracian emancipacion de virinoj, anstataŭ katolikan lernejon enkonduki lernejon senreligian kaj koedukantan. Jen ni dum ĉi tiu kongreso pripensos ĉion, kiamaniere oni povas kaj devas kontraŭstari ĉi tiujn malvirtojn kaj malbonajn influojn, kaj tiamaniere **renovigi ĉion en Kristo.** — Sur kampo sociala kaj ekonomia laboras grupeto da semantoj kaj rikoltantoj, sed la semado estas ĝis nun nesufiĉa, kaj rikoltoj ne riĉaj. Ni vidas kun malĝojo, ke pli kaj pli da kortegaj kaj vilaĝaj mastrumoj trairas al homoj al nia nacia neamikaj, ke en urboj la klaso metiista perdas siajn domojn kaj falas en grandan mizeron, ke pli granda parto da laboristaro staras sub la „ruĝa" standardo, ke la vilaĝanoj per la elmigrado eksterlanden liberigas sin de la malsato, ke inter la popolamaso ekzistas multe da mallumeco, kaj ke ĉefe tiu ĉi mallumeco (intelekta) estas kondukinta la milojn al „mariavitismon" aŭ al eklezioj „nedependaj".

Certe ke ne malgranda estas ĝojigo por ni, ke en nia lando iom post iom plimultiĝas preĝejoj, lernejoj, legejoj, malsanulejoj prizorgejoj, kasoj, terkulturistaj rondoj (por vilaĝanoj) kaj diversspecaj ligoj, ke grupo da noblaj homoj laboras por pretigi al malpli klera kaj malpli riĉa frataro la lumon kaj panon, sed kial ĉi tiuj fervoraj laboruloj estas tiel malmultaj precipe inter viroj de la klerula sfero? Kial al ĉi tiu tuta laborado mankas programo de unuanima agado kaj persistado? Kial la katolikaj revuoj, organoj, asocioj, institucioj multfoje trovas tiel malfortan apogon kaj subtenon, ke ili preskaŭ ftizan vivon kondukas? Kial pola industrio kaj komerco ne povas leviĝi el lulilo? Kial en nia lando inter fratoj kaj najbaroj ekzistas tiom da malkonsento kaj ofte tiom da malkaŝa batalado? Kial tiuj, kiuj okupas sin pri la edifado de la nacia kaj sociala konstruo ornamas diligente la murojn kaj tegmenton, kaj

tamen tiom malmulte zorgas pri la fundamento mem de tiu konstruo? Respondi je ĉi tiuj demandoj kaj pripensi ĉion, kio al nia nacio estas utila, estos la tasko de nuna kongreso.

Fine la plej grava demando estas la efektivigo de la katolika organizo, ĉar de tio dependas nia venko super tiom da falangoj malamikaj! Ni rigardu la aliajn naciojn! Jen en Francujo kaj Italujo la plimulto da katolikaro pro tio malvenkas, ke tie ne ekzistis organizo, aŭ ke oni tiun organizon estas malĝuste farinta; ree en Germanujo kaj Belgujo kaj Nederlando pro tio la katolikaro staras forte, ke ĝi estas bone organizita kaj armita. Se ankaŭ ni Poloj volus nin savi, nenio alia ekzistas krom organiziĝi en katolika, nacia spirito. Jen dum ĉi tiu kongreso ni interkonsiliĝas pri tio, kiamaniere ni devas laŭ la papaj enciklikoj kondukadi la katolik-socialan agadon, kaj ne nur vivigi la katolikajn asociojn sed ilin kuncentrigi kaj unuigi, plie kiamaniere efektivigi la profesiajn organizojn hodiaŭ necesegajn, kiamaniere efektivigi la ĝeneralan organizaĵon ĉu sub la nomo „Asocio katolik-sociala", ĉu sub alia devizo kuntiri kaj kunligi ĉiujn katolikojn senrilate al diferenco de klaso aŭ partio tiel, ke ĉi tiu ĝenerala organizaĵo cirkaŭprenu ĉiujn paroĥojn, ĉiujn eparkiojn, tutan landon. Mi finas miajn vortojn per vortoj jenaj: „Al armiloj! Kiam la malamika militistaro alproksimiĝas al limoj de ia lando, tiam eliras kontraŭ ĝi sur la batalkampon la regula" t. e. ekzercita militistaro, post ĝi ree formiĝas „ĝenerala movado", ĉar ĉiu landano devas defendi la patrujon per tia armilo, per kia li povas kaj kapablas batali. Nuntempe estas alveninta por pola nacio la tempo de la pli granda laboro kaj pli obstina batalado; pro tio ĉiu, kiu ŝatas sian propran kaj de sia nacio savon devas fari tiom da bonaĵo, kiom li povas kaj, aŭdante batalan alvokon, devas kuri sur batalkampon por defendi la plej karajn trezorojn de polaj animoj. Do ĉiuj, ĉu pastroj, ĉu laikuloj, ĉu viroj, ĉu virinoj, ĉu granduloj, ĉu malgranduloj, ĉu scienculoj, ĉu malkleruloj, organizitaj en fortaj kolonoj staru apude siaj estroj-kondukantoj kaj batalu kuraĝege sub la stan-

dardo, sur kiu, same kiel iam sur standardo de Granda Konstantino, brilas la surskribo: „In hoc signo vinces" (Sub ĉi tiu signo vi venkos), kaj la ĉiela Reĝino certe elpetos por ni la venkon"!

Pastro Jozefo SZUREK,
en Lonczki apud Frysztak (Galicio-Aŭstrio).

---

# OFICIALAJ SCIIGOJ.

*En tiun-ĉi rubrikon ni enpresigos oficialajn sciigojn de la Centra Komitato de I. K. U. E., de la diversaj Komitatoj, de la Sekcioj de I. K. U. E., de la Redakcio kaj Administracio de E. K., de la Kongresoj estintaj kaj estontaj, k. t. p.*

**Al la Anaro de I. K. U. E. kaj la Legantaro de E. K.**

KARAJ GESAMCELANOJ,

Ĝojege mi profitas la okazon de l'jarŝanĝo por kore bondeziri al miaj gesamideanoj *novjaron plej eble feliĉigan.*

Daŭran bonfarton personan, nepran feliĉon familian, kontentigan prosperadon aferan, alivorte: Ĉion, kion povos feliĉiĝi niajn gesamcelanojn, alportu al ili la nova jaro!

Abunde elversiĝu la necesegaj benoj ĉielaj super iliajn respektindajn familiojn, dum 1912 kaj dum arego da sekvontaj jaroj!

Ĉi-tion sincere deziras, koregе esperas, fervore preĝas la Centra Komitato de I. K. U. E. —

Vidante la bonvolemon, je kiu jam multnombre respondis niaj Eŭropaj eĉ ekstereŭropaj samreligianoj la alvokon, pro kunhelpo, kiun mi faris en la Novembra numero de E. K., mi konfidplene eniras la jaron 1912; sed, ĉar la tempo ne staras, eĉ ne marŝas, sed flugas, mi afable petas, ke la sekretario de ĉiuj Unuiĝoj aŭ Kluboj Katolikaj, rememoru persone mian suprediritan alvokon, kaj rememorigu tiun demandon al siaj anaroj.

Tiamaniere ni sendube rapidigos la eldonon de nia adresaro, tiel necesega, kiel utila por nia sankta afero, kiu kreskos kaj florados, nur kondiĉe de nia daŭra kunlaborado frata.

Ĉiam, ĉie, ĉiu el ni konsciu ke: disvastigi, fortigi, grandigi, utiligi kiel eble plej praktike, efike kaj daŭre nian karan I. K. U. E., unuvorte ĝin evoluciadi ĉiuflanke, estas nia unua devo kaj restas nia gravega neforgesota tasko dum la venonta jaro!

Frate vin salutas nome de la Centra Komitato de I. K. U. E.

FRANS. J. C. M. KNAAPEN,
Ĝenerala Sekretario.

Tilburg, la 20-XII-11.

---

# Kroniko de I. K. U. E.

## Jarraporto pri nia movado en Germanujo.

I. K. U. E. en Germanujo ampleksas tri ŝtatajn ligojn, nomitajn: **Katolika Unuigo „Bavaruja", „Saksuja"** kaj **„Nordgermanuja"** kun kune 300 membroj. Katolika Unuiĝo por „Orient- kaj „Okcidentgermanujo" fondiĝos baldaŭ. Landaj Oficejoj estas por Bavarujo en Augsburg (Sulzer Str.), por Saksujo en Wechselbourg i/Sa, por Nordgermanujo en Braunschweig (Brunsvigo, Pestalozzi Str. 5). La Estraroj estas apartaj kaj landaj Delegitaroj; Ĉefdelegitoj zorgas pri la aferoj de l'lando kaj plenumas ĉiajn devojn. Ĉefdelegito por Bavarujo estas Sro SCHOLZ, eldonisto en Augsburg, por Saksujo: Sro grafa sekretario en Wechselburg kaj por Nordgermanujo: Sro CHRISTOFFEL, komercisto en Brunsvigo. Grupoj ekzistas en Augsburg, Straubing, Geltendorf, Dresden, Glauchau kaj baldaŭ ankaŭ en Muncheno, Kempten, Regensburg (Ratisbona), Posen kaj Krotoschin. Kiel membroj la germanaj ligoj de I. K. U. E. posedas multajn firmojn kaj katolikajn societojn kun aliaj celoj. La Delegitoj kaj Oficejoj donas informojn ĉiaspecajn

— unualoke al firmoj komercajn informojn. La germanlandaj I. K. U. E.-anoj posedas ankaŭ pruntbibliotekon kaj oficialan gazeton: **„Germana Katoliko"** (3a jarkolekto), kiu estu rekomendata al niaj eksterlandaj samideanoj por informi ilin pri la germana movado. I. K. U. E. havas en Germanujo tre bonajn aspektojn. Ĝia pezocentro estas helpi kaj akceli la katolikajn komercistajn aferojn kaj unuigi ĉiajn ligojn, unuiĝojn, societojn katolikajn sub la standardo de verda stelo. Tio tute ne estas utopio! La komenco estas farita. Sed ankaŭ niaj religiaj celoj havas bonan progreson. Estas laŭdinde kaj grave, ke en Bavarujo kaj ankaŭ en Germanujo la ŝtato ŝirmas fidele la eklezion. Oni sufiĉe alte taksu, ke ĝis hodiaŭ 26.000 anoj (membroj de aliaj ligoj katolikaj, kolektive alligitaj al I. K. U. E.) batalas por niaj ideoj kaj celoj! Ni rajtas diri: en Germanujo niaj aferoj iras ĉiam antaŭen.

R. SCHOLZ.

---

## Katolika Esperanta Societo en Italujo.

Post konferenco kaj kurseto de Pro BIANCHINI oni starigis katolikan esperantan societon en **Pordenone** (Udine—Italujo). Jen la korespondantoj kun eksterlando:

Don Luigi COMERER, pastro S. Marko, konfesprenanto kaj religia konsilanto.

S-ro Miĥelanĝelo PRESSI, C. Garibaldi 9, ricevas kaj donas kian ajn korespondon utilan al elmigrantaj laboristoj.

F-inoj Elda kaj Felicita DONADUZZI, C. Vitt. Em. Palazzo Toffoli, por la helpo de junulinoj.

*Provizora Esperanta Oficejo* ĉe S-ro Nikolao MARTINUZZI, C. Vitt. Em. 65.

N.B. La diritaj gesinjoroj petas kaj donas informojn nur per pagita respondo.

## La „Oktavo de Preĝado".

Pastro RICHARDSON ricevis jenan leteron de nia Anglikana amiko Rev. A. H. NANKIVELL:

Linden Crove, Torquay, 5 decembro 1911.

Tre Estimata Direktoro,

Se plaĉos al vi, mi petas permeson por memorigi al la legantoj de E. K. la alproksimiĝantan Oktavon de Preĝado por la plenumo de la peto de nia Dia Sinjoro al lia ĉiela Patro „ke ĉiuj estu unu". La lasta Januaro estis la kvara jarreveno de la komenco de tiu ĉi Oktavo de Preĝado. Tiu Oktavo estis aranĝita de la Redaktoro de la Usona Gazeto „The Lamp" antaŭ ol li submetiĝis al la Sankta Seĝo. Post lia konvertiĝo la Oktavo daŭris sub la aprobo de la Ekleziaj Aŭtoritatoj kaj eĉ de Lia Papa Moŝto. La Oktavo komenciĝas kun la festo de la katedro de S. Petro, je la 18a de Januaro, kaj finiĝas kun la festo de la konvertiĝo de S. Paŭlo.

Via sindoneme,
A. H. NANKIVELL.

---

## Nia Movado inter Laboristaro.

Dum „Nia Dua" Pastro L. POELL el Tilburg (Nederlando) legis sian raporton pri „Esperanto kaj Elmigrado." Klare li montris, kiom Esperanto povos utili al komercistoj, instruistoj, k. a., dume li per ciferoj almontris la migradon de l'laboristoj, precipe en Ameriko, Parizo kaj Londono. Al la fino de sia raporto li instigis la Katolikajn Popolligojn, instruigi Esperanto(n) al ĝiaj membroj.

„Ne falas frukto malproksime de la arbo". En Hago Pastro POELL semis kaj sekve de lia semado (legu: parolado) la 11an de Oktobro okazis tie propagandkunveno, por fondi „Klubo de Katolikesperantistaj Laboristoj". S-ra moŝto majoro J. P. L. NIESTEN, konata, fervorega propagandisto el Rotterdam kaj vic-prezidanto de la Nederlanda Katolika Esperantista Ligo, elokvente parolis pri „Esperanto

en la servo de l'Katolika Laboristarmovado", kaj montris per faktoj la utilecon de Esperanto por la laboristo, samtempe atentigante la aŭdantaron pri la simpleco de nia lingvo internacia.

Rezultato estas, ke fondiĝis „Klubo de Katolikesperantistaj Laboristoj: Nia Sankta Kredo", kiel sekcio de la „Nederlanda Rom-Katolika Popolligo". Jam 70 personoj enskribigis sin kiel membroj.

Sekretario de la novfondita Societo estas: S-ro JOH. VAN LITH, topografiisto, Rijswijksche Weg 58, Hago (Nederlando).

C.

---

## Interŝanĝo de Pastroj.

*Propono de P-ro* BECKER, *akceptita de „Nia Dua"* (vidu *Espero Katolika*, Nov. 1911, p. 272).

Ĉar multaj paroĥestroj havas en siaj paroĥoj grandan nombron da fremduloj, kaj ili, por ke ili bone zorgu por la animoj, ne nur devas scii Esperanton, sed ankaŭ la kutimojn de la fremdaj paroĥanoj;

sed malmultaj havas sufiĉe da mono por loĝi longe en fremdaj landoj;

do estus tre utile, ke la paroĥestroj interŝanĝiĝu inter si (ekz. germana pastro kun itala aŭ franca);

tial:

tiu ĉi Dua Internacia Katolika Kongreso de I. K. U. E. esprimas la deziron, ke la esperantistaj gazetoj sciigu la nomojn de tiuj pastroj, kiuj por ia tempo intencas loĝi en fremda lando.

---

## Opinio de P-ro Richardson pri U. E. A.

Ni legas en *Esperanto;* Oficiala Organo de U.E.A.:

„El multaj leteroj, kiujn ni ricevis kaj en kiuj estas esprimata la sama ideo, ni citos tiun de S-ro Abato RICHARDSON, kiu post demando respondis, ke li ne nur aprobas, sed deziras la publikigon:

„U.E.A., estas societo, kiun mi altestimas kaj efektive konsideras kiel la solan kaj veran praktikon de Esperanto. Se U.E.A. sukcesos, Esperanto sukcesos, se U.E.A. devus fali, nia movado eble dum longaj jaroj faros nenian progreson. Mi diras tion, por ke vi komprenu, ke mi estas kore kaj anime ligata al U.E.A."

Kaj en dua letero li aldonas: „Nia Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista estas Esperantia Entrepreno, sed mi, kiel Prezidanto, esprimas la deziron, vidi ĉiun „Unuiĝanon" samtempe membron de U.E.A. Tio nepre aldonus pli da forteco al nia movado".

---

# PREĜO.

**de Mikaélo Lérmontov.**

---

En horo malfacila
De kora la sufer',
Nur preĝon mi humila
Ripetas je parker'!

Kaj bena forto iras
De vortaj, de kunson',
En ili ĝoja spiras
Mirinda sankta son'!

L'animo ne doloras,
Kaj dubo estas for,
Kaj kredas mi, kaj ploras,
Kaj gajas mia kor'!

Internaciigis Ivan SELEZNJOV.